



EL POPOLA ĈINIO

人民中國報

10

1971



Lanŝpinejoj estas konstruitaj preskaŭ en ĉiuj gravaj lokoj de Hingiang.
Ien laboristinoj de la lanŝpinaĵo "La de Aŭgusto" de Hingiang en laboro.

Deklaro de la Ministerio de Eksteraj Aferoj de la Ĉina Popola Respubliko

La 20-an de aŭgusto, 1971

**Albanio, Alĝerio
kaj 16 Aliaj Landoj
Elmetis Projektan Rezolucion
al la Unuiĝintaj Nacioj**

EL POPOLA ĈINIO, N-RO IO, 1971

Deklaro de la Ministerio de Eksteraj Aferoj de la Ĉina Popola Respubliko

La 20-an de aŭgusto, 1971

Surbaze de la “Deklaro pri la Reprezentanteco de Ĉinio en la Unuiĝintaj Nacioj” farita de la ŝtata sekretario de Usono Rogers je la 2-a de aŭgusto, George Bush, ĉefdelegito de Usono en la Unuiĝintaj Nacioj, prezentis leteron kaj memorandon je la 17-a de aŭgusto de 1971 al la ĝenerala sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj, oficiale postulante, ke oni metu la tiel nomatan problemon pri “la reprezentanteco de Ĉinio en la Unuiĝintaj Nacioj” en la tagordon de la 26-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj. La usona registaro deklaras, ke la “Ĉina Popola Respubliko devas esti reprezentata”, sed samtempe pledas por tio, ke estas “necese kondiĉi ne senigi la reprezentantecon de la Ĉina Respubliko (tio signifas la Ĉiang Kajŝek-klikon — same en la sekvanta teksto)”. Tio ĉi estas plena malkaŝo de la intrigo de la Nixon-registaro por fabriki “du Ĉiniojn” en la Unuiĝintaj Nacioj. La ĉina registaro kaj la ĉina popolo absolute ne povas toleri tion kaj firme oponas kontraŭ tio.

La usona registaro asertas: “En trakto de la problemo de reprezentanteco de Ĉinio, la Unuiĝintaj Nacioj devas koni la ekziston tiel de la Ĉina Popola Respubliko kiel de la Ĉina Respubliko, kaj speguli tiun nedisputeblan realon en la maniero per kiu ĝi kondiĉas la reprezentantecon de Ĉinio.” Tio ja estas aĵo plej absurda.

En la mondo absolute ne ekzistas “du Ĉinioj”, sed nur unu Ĉinio, nome la Ĉina Popola Respubliko; Tajvan estas nedisigebla parto de la ĉina teritorio kaj unu el la provincoj de Ĉinio, kaj ĝi estis redonita al la patrolando post la Dua Mondmilito. Tio ja estas nedisputebla realo. Tio, ke Usono armite okupas ĉinan Tajvan kaj la Tajvan-markolon, neniom ŝanĝas la sanktan suverenecon de la Ĉina Popola Respubliko super Tajvan. Nur pro la armita protekto de Usono, la Ĉiang Kajŝek-kliko delonge damnita de la ĉina popolo povas ankoraŭ ekzisti agonie sur Tajvan. De pli ol dudek jaroj, la usona registaro arbitre metas la Ĉiang Kajŝek-klikon en la Unuiĝintajn Naciojn, por ke ĝi uzurpu la sidlokon de la Ĉina Popola Respubliko. Tio estas kruda interveno en la internajn aferojn de Ĉinio kaj ankaŭ granda moko al la Unuiĝintaj Nacioj.

La usona registaro malkaŝe klopodas por fabriki “du Ĉiniojn” en la Unuiĝintaj Nacioj asertante, ke “la Unuiĝintaj Nacioj ne devas esti postulataj esprimi sian starpunkton pri la kontraŭstaraj pledoj elmetitaj respektive de la Ĉina Popola Respubliko kaj la Ĉina Respubliko por atendi pacan solvon de la afero laŭ la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj”. Tio estas senskrupula distordo de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj. Paca solvo de disputo difinita en la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj aludas rilatojn inter landoj. La rilato inter la ĉina popolo kaj

la Ĉiang Kajŝek-kliko estas tute interna afero de Ĉinio. En la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj estas eksplicite difinite, ke ne devas esti interveno “en aferojn kiuj estas esence en la enlanda aŭtoritato de iu lando”. La usona registaro intrigas detranĉi Tajvan de Ĉinio kaj vane esperas devigi la membrojn de la Unuiĝintaj Nacioj subiĝi sub ĝia volo. Ĉiu ajn suvereneca ŝtato ne povas ne firme oponi kontraŭ tiu barbara ag-maniero de sinteno kiel mastro kaj uzo de la Unuiĝintaj Nacioj por antaŭenpuŝi potencon politikon.

Estas necese montri, ke la Ĉina Popola Respubliko estas senigita je la laŭleĝaj rajtoj en la Unuiĝintaj Nacioj nur fare de la usona registaro. Antaŭ 22 jaroj, la ĉina popolo renversis la reakcian regadon de la Ĉiang Kajŝek-kliko en Ĉinio. Ekde la tago de sia fondiĝo, la registaro de la Ĉina Popola Respubliko jam estas la unika laŭleĝa registaro reprezentanta la tutan ĉinan popolon, kaj la sidloko de Ĉinio en la Unuiĝintaj Nacioj nature apartenas al la Ĉina Popola Respubliko. Multaj membroj en la Unuiĝintaj Nacioj ŝanĝis sian reg-potencon, inkluzive de kazoj de ŝanĝo de la ŝtata nomo, sed neniam tio influis ilian sidlokon en la Unuiĝintaj Nacioj. La restarigo de la laŭleĝaj rajtoj de la Ĉina Popola Respubliko en la Unuiĝintaj Nacioj estas simpla problemo de procedo. Sed la usona registaro ludas ĉiajn artifikaĵojn kaj almetis ŝtonojn sur la vojon, por ke la Ĉiang Kajŝek-kliko konservu la sidlokon en la Unuiĝintaj Nacioj kaj la Ĉina Popola Respubliko estu ekskluzivita de la Unuiĝintaj Nacioj.

La restarigo de la laŭleĝaj rajtoj de la Ĉina Popola Respubliko en la Unuiĝintaj Nacioj kaj la forpelo de la Ĉiang Kajŝek-kliko el la organizo estas du neapartigeblaj flankoj de unu problemo. En la 15-a de julio, 1971, Albanio, Alĝerio kaj 16 aliaj landoj elmetis al la Unuiĝintaj Nacioj projektan rezolucion, postulantan la restarigon de ĉiuj laŭleĝaj rajtoj de la Ĉina

Popola Respubliko en la Unuiĝintaj Nacioj, la agnoskon de la reprezentantoj de la registaro de la Ĉina Popola Respubliko kiel la unikaj laŭleĝaj reprezentantoj de Ĉinio al la Unuiĝintaj Nacioj, la agnoskon de la Ĉina Popola Respubliko kiel unu el la kvin konstantaj membroj de la Sekureca Konsilantaro kaj la tujan elpelon de la reprezentantoj de la Ĉiang Kajŝek-kliko el la Unuiĝintaj Nacioj kaj ĉiuj ĝiaj organoj. Tio estas la sola ĝusta kaj racia propono por restarigo de la laŭleĝaj rajtoj de la Ĉina Popola Respubliko en la Unuiĝintaj Nacioj. La ĉina registaro kaj la ĉina popolo esprimas admiron kaj dankon al tiuj landoj, kiuj elmetis ĉi tiun projektan rezolucion kaj al aliaj landoj, kiuj subtenas justecon por restarigi la laŭleĝajn rajtojn de la Ĉina Popola Respubliko en la Unuiĝintaj Nacioj.

La ĉina registaro solene deklaras: la ĉina popolo kaj la ĉina registaro firme oponas kontraŭ “du Ĉinioj”, “unu Ĉinio, unu Tajvan” aŭ aliaj similaj absurdaĵoj, firme oponas kontraŭ la absurdaĵo ke “la aparteneco de Tajvan ankoraŭ ne estas determinita” kaj firme oponas kontraŭ la intrigo pri “sendependiĝo de Tajvan”. Se situacio de “du Ĉinioj”, “unu Ĉinio, unu Tajvan” aŭ “la aparteneco de Tajvan ankoraŭ ne estas determinita” aŭ alia simila situacio okazos en la Unuiĝintaj Nacioj, la registaro de la Ĉina Popola Respubliko firme havos nenian rilaton kun la Unuiĝintaj Nacioj. Tiu ĉi justa starpunkto de la ĉina registaro estas neŝancelebla. Neniam sukcesos la intrigo pri “du Ĉinioj”, “unu Ĉinio, unu Tajvan” aŭ similaj puŝata de iu ajn ĉe ajna tempo aŭ en ĉia ajn formo. La Ĉiang Kajŝek-kliko nepre devas esti forpelita el la Unuiĝintaj Nacioj kaj ĉiuj ĝiaj organoj, kaj ĉiuj laŭleĝaj rajtoj de la Ĉina Popola Respubliko en la Unuiĝintaj Nacioj devas esti komplete restarigitaj. La ĉina registaro firme kredas, ke la justa propono elmetita de Albanio, Alĝerio kaj 16 aliaj landoj venkos finfine.

Albanio, Alĝerio kaj 16 Aliaj Landoj Elmetis Projektan Rezolucion al la Unuiĝintaj Nacioj

Letero de Albanio, Alĝerio kaj Aliaj Landoj al la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj

Dudeksesa Sesio

Postulo pri Enmeto en la Provizora Tagordo
de la 26-a Sesio

Restarigo de la Laŭleĝaj Rajtoj de la Ĉina
Popola Respubliko en la Unuiĝintaj Nacioj

Letero adresita al la ĝenerala sekretario, je la
15-a de julio 1971, de la reprezentantoj de Albanio,
Alĝerio, Kubo, Gvineo, Irako, Malio, Maŭritanio,
la Popola Demokratia Respubliko de Jemeno,
la Popola Respubliko de Kongo, la Unuigita
Respubliko de Tanzanio, Rumanio, Somalio, Su-
dano, Sirio, Jemeno, Jugoslavio kaj Zambio.

Laŭ la instrukcioj de niaj registaroj, ni havas la
honoron prezenti al vi la postulon enmeti la proble-

mon titolitan "Restarigo de la Laŭleĝaj Rajtoj de
la Ĉina Popola Respubliko en la Unuiĝintaj Nacioj"
kiel urĝan problemon en la tagordon de la 26-a
Sesio de la Ĝenerala Asembleo.

Laŭ la 20-a regulo de la regularo de proceduro
de la Ĝenerala Asembleo, la klariga memorando kaj
la projekta rezolucio estas aldonitaj al la letero.

(Subskriboj) S. Baholli (Albanio)
A. Bensmail (Alĝerio)
R. Alarcon Quesada (Kubo)
El Hadj A. Toure (Gvineo)
T. El-Shibib (Irako)
S. Traore (Malio)
M. El Moctar Bal (Maŭritanio)
A. M. Ismail (la Popola Demo-
kratia Respubliko de Jemeno)
N. Mondjo (la Popola Respubliko
de Kongo)
S. A. Salim (la Unuigita Respubli-
ko de Tanzanio)
G. Diaconescu (Rumanio)
A. A. Farah (Somalio)
K. Mustafa (Sudano)
R. Jouejati (Sirio)
A. Al-Hadad (Jemeno)

A. Psoncak (Jugoslavio)
K. S. B. Nyirenda (Zambio)

Klariga Memorando

1. La registaroj de Albanio, Alĝerio, Kubo, Gvineo, Irako, Malio, Maŭritanio, la Popola Demokratia Respubliko de Jemeno, la Popola Respubliko de Kongo, la Unuigita Respubliko de Tanzanio, Rumanio, Somalio, Sudano, Sirio, Jemeno, Jugoslavio kaj Zambio konsideras, ke la problemo de la restarigo de la laŭleĝaj rajtoj de la Ĉina Popola Respubliko en la Unuiĝintaj Nacioj havas pli esencan signifon ol iam ajn, precipe por la estonteco de la organizo. Ili restas firme konvinkitaj pri la justeco de la starpunkto, kiun ili defendis kaj kiu estas refoje pruvita per la subteno donita de la plimulto de membroj-ŝtatoj en la 25-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo al la restarigo de la laŭleĝaj rajtoj de la Ĉina Popola Respubliko en la Unuiĝintaj Nacioj.

2. Dum jaroj ĉi tiuj registaroj senĉese riproĉis kaj malaprobis la malamikan kaj diskriminacian politikon sekvatan de kelkaj registaroj koncerne al la laŭleĝa registaro de Ĉinio, la sola vera reprezentanto de la distinginda ĉina popolo, kiu estas heredanto de antikva civilizo kaj firme iras sur la vojo de progreso. La obstina rifuzado al la restarigo de la laŭleĝa sidloko de la Ĉina Popola Respubliko en la Unuiĝintaj Nacioj estas evidente ne nur ekstreme serioza nestado de justeco sed, antaŭ ĉio, ankaŭ malakorda al unu el la esencaj principoj de nia organizo, nome, tiu de universaleco. Tiu ĉi rifuzo, kiu estas bazita pure sur politikaj konsideroj, estas kontraŭa al la spirito, kiu gvidis la kreadon de nia organizo.

3. Tiu ĉi granda potenco, la plej dense loĝata sur la tero, kun pli ol 700 milionoj da loĝantoj aŭ kvarono de la tuta homaro, membro-fondinto de la Unuiĝintaj Nacioj kaj konstanta membro de la Sekureca Konsilantaro, estas senigita ekde 1949 per sistemaj manovroj je la rajto okupi sian sidlokon kiun ĝi laŭleĝe havas. Doni la reprezentantecon de la ĉina popolo al la Ĉiang Kajŝek-kliko estas nenio alia ol intenca, absurda, danĝera kaj obstina rifuzo al rekono de realoj.

4. Plie, ne necesas ripeti, ke en la kampo de internaciaj rilatoj la registaro de la Ĉina Popola Respubliko ĉiam sekvas politikon kiu celas solvi per pacaj rimedoj ĉiujn disputojn, kiuj povas ekzisti aŭ okazi inter sendependaj ŝtatoj. La kiel eble plej bona ekzemplo de tiu ĉi politiko estas liverita de ĝia rigora observo de la Ĝenevaj Interkonsentoj de 1954 pri Hindoĉinio kaj tiuj de 1962 pri Laos, kies subskribinto ĝi estas.

5. La faktoj jam kaj, cetere, tute sufiĉe montris ke Ĉinio sincere deziras pacon kaj pacan kunekziston kun ĉiuj landoj sur la bazo de la principoj de respekto al sendependeco kaj teritoria integreco, neinterveno en internaj aferoj, egaleco, reciproka respekto kaj la rajto de ĉiu popolo en decido de sia propra sorto. La internaciaj rilatoj de la Ĉina Popola Respubliko konstante disvolviĝas kaj ĉiam pli granda nombro da landoj starigas, unu post alia, diplomatajn kaj aliajn rilatojn kun ĝi. Ĉinio ĉiam subtenas la popolojn batalantajn kontraŭ koloniismo de ĉiuj formoj, por uzi sian rajton de memdecido kaj sendependeco laŭ la principoj de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj.

6. Oponante kontraŭ la restarigo de la laŭleĝaj rajtoj de la Ĉina Popola Respubliko en la Unuiĝintaj Nacioj, sub falsaj pretekstoj kaj akuzoj pri la internacia konduto de tiu lando, Usono fakte mem malobservas la principojn kaj celojn de la Ĉarto. Niaj registaroj estas en pozicio povanta refuti tiujn asertojn. Niaj ŝtatoj tenas amikajn rilatojn kun Ĉinio, kiel plejparto de la ŝtatoj de la internacia komunumo, malgraŭ diferencoj en la politikaj, ekonomiaj kaj sociaj sistemoj, kaj tio ĉiutage pravas la senbazecon de tiuj akuzoj. Tiu-rilate, estas necese rimarkigi, ke la Ĉina Popola Respubliko ĉiam montris plenan respekton al la sendependeco kaj digneco de aliaj landoj.

7. La "kvarantena" politiko kiun certaj potencoj sekvadis dum multaj jaroj kontraŭ la Ĉina Popola Respubliko estas nerealista kaj danĝera, ĉar estas rekonate, ke neniuj grava internacia problemoj povas esti solvitaj sen la partopreno de tiu lando. Estas plene pruvite, ke estas neeble ekskluzivi Ĉinion, grandan nuklean kaj spacan potencon, de ĉefaj decidoj kaj samtempe postuli de ĝi konsenti al la devigoj truditaj de interkonsentoj, kiujn ĝi ne partoprenis. Samtempe estas neeble, unuflanke, rekonii la internacian rolon de la Ĉina Popola Respubliko kaj, aliflanke, rifuzi al ĝi la laŭleĝan sidlokon

en la Unuiĝintaj Nacioj, kies ĉefa celo estas komuna serĉado de solvoj de problemoj, kiuj leviĝas en la mondo. Tiu ĉi starpunkto estas logike kaj praktike nedefendebila.

8. La realeco de la ekzisto de la Ĉina Popola Respubliko, memkompreneble, ne povas esti ŝanĝita por konformiĝi al la mito pri la t. n. "Ĉina Respubliko", fabrikita el parto de la ĉina teritorio. Estas bone konate, ke la kontraŭleĝaj aŭtoritatoj instalitaj en la insulo Tajvan, kiuj pretendas la reprezentantecon de Ĉinio, povas resti tie nur dank' al la konstanta ĉesto de la armitaj fortoj de Usono.

9. Sekve, estas en la fundamentaj interesoj de la Unuiĝintaj Nacioj tuj fini tiun ĉi neakcepteblan kaj danĝeran situacion, kiun iuj daŭre klopodas trudi al la internacia komunumo, malobservante al ĉiuj principoj, por plenumi kaj antaŭenpuŝi politikon, kiu estas ĉiam pli riproĉata. Kaj, krome, la malfeliĉa precedenco, kiun kreas tiu ĉi sinteno, povas nur estigi malcertecon al multaj membroj-ŝtatoj pri la estonteco de la nacia unueco kaj teritoria integreco.

10. Sekve, niaj registaroj estas konvinkitaj ke la restarigo de la laŭleĝaj rajtoj de la Ĉina Popola Respubliko en la Unuiĝintaj Nacioj kaj en ĉiuj ĝiaj subordigitaj kaj alligitaj organoj, kaj la rekonon de la reprezentantoj de la registaro de la Ĉina Popola Respubliko kiel la solaj laŭleĝaj reprezentantoj de Ĉinio al la Unuiĝintaj Nacioj estas absolute kaj urĝe necesaj por plifortigi la aŭtoritatecon kaj prestiĝon de la organizo. Tio postulas tujan forpelon de la reprezentantoj de la Ĉiang Kajŝek-kliko el la sidloko kiun ili maljuste okupas en la Unuiĝintaj Nacioj kaj en ĉiuj ĝiaj alligitaj organoj. Niaj registaroj konsideras ke prokrasto de tiu ĉi neevitebla faro povas nur konduki al plia redukto de la aŭtoritateco de la Unuiĝintaj Nacioj en la okuloj de la internacia komunumo je tempo en ĝia historio, kiam ĝi tiom bezonas tiun ĉi aŭtoritatecon por atingi siajn ĉefajn celojn.

11. Ĉikune ni aldonas, por prikonsiderado de membroj-ŝtatoj, projektan rezolucion postulant la restarigon de ĉiuj rajtoj de la Ĉina Popola

Respubliko, la rekonon de la reprezentantoj de ĝia registaro kiel la solaj laŭleĝaj reprezentantoj de Ĉinio al la Unuiĝintaj Nacioj kaj la rekonon de la Ĉina Popola Respubliko kiel unu el la kvin konstantaj membroj de la Sekureca Konsilantaro, kaj ankaŭ la tujan forpelon de la reprezentantoj de la Ĉiang Kajŝek-kliko de la sidlokoj kiujn ili kontraŭleĝe okupas en la Unuiĝintaj Nacioj kaj en ĉiuj ĝiaj subordigitaj organoj. Post interkonsiliĝoj, la registaro de Pakistano subtenas tiun ĉi proponon kaj aliĝis al la projekta rezolucio.

Projekta Rezolucio

Restarigo de la Laŭleĝaj Rajtoj de la Ĉina Popola Respubliko en la Unuiĝintaj Nacioj

La Ĝenerala Asembleo,

Rememorante la principojn de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj,

Konsiderante ke la restarigo de la laŭleĝaj rajtoj de la Ĉina Popola Respubliko estas necesa tiel por la protekto de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj kiel por la afero kiun la Unuiĝintaj Nacioj devas priservi sub la Ĉarto,

Rekonante ke la reprezentantoj de la registaro de la Ĉina Popola Respubliko estas la solaj laŭleĝaj reprezentantoj de Ĉinio al la Unuiĝintaj Nacioj kaj ke la Ĉina Popola Respubliko estas unu el la kvin konstantaj membroj de la Sekureca Konsilantaro,

Decidas restarigi ĉiujn rajtojn de la Ĉina Popola Respubliko kaj rekonon la reprezentantojn de ĝia registaro kiel la solajn laŭleĝajn reprezentantojn de Ĉinio al la Unuiĝintaj Nacioj, kaj forpeli tuj la reprezentantojn de Ĉiang Kajŝek de la sidlokoj kiujn ili kontraŭleĝe okupas en la Unuiĝintaj Nacioj kaj ĉiuj ĝiaj subordigitaj organoj.

La Industria Produkto en Prospero


La Dongfanghong-a Traktora Fabriko de Luojang mem projektis amfibian traktoron "Dongfanghong-40" kaj jam komencis ĝin produkti pogrande.



工业学大庆



La Dongfeng-a Papera Fabriko de Ĝegiang senĉese akiras novajn sukcesojn.



La Ŝanhaja Fabriko de Nenormalaj Ŝtaltuboj klopodas produkti pli multajn kaj pli bonajn ŝtaltubojn por la ŝtato.



Laboristoj de la Fuŝun-a Fosmaŝina Fabriko sukcese projektis kaj fabrikis novtipan ŝarĝomaŝinon de erco, kiu povas kontinue movi aŭ laŭtavole fosi en ĉiu horo 200 kubajn metrojn da erco.



Petrola industrio en disvolvigo





Laboristoj de la Fuhin-a Elektrejo de Liaŭning-provinco laboras sur alttensia linio sen interrompo de kurento.

Nova Disvolviĝo de la Fera kaj Ŝtala Industrio de Ĉinio

KUN la alveno de nova alta tajdo de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando, nova prospera situacio aperis en la fera kaj ŝtala industrio.

En la malnova Ĉinio, sub la duobla subpremo de imperiismo kaj feŭdismo, la produkto de fero kaj ŝtalo estis tre postĝinta. Ekde la lastaj jaroj de King-dinastio, tra la fuŝado de Nordaj Militaristoj kaj kuomintanga reakcia registaro, la ŝtala industrio trapasis 59 plenajn jarojn kaj je la Liberigo de la tuta lando en 1949, la jara produktokvanto de ŝtalo estis nur 50,000 tunoj.

Post la restariga periodo de la nacia ekonomio kaj la Unua Kvinjara Plano (1953-1957) post la fondiĝo de la nova Ĉinio, nia fera kaj ŝtala produkto akiris daŭran disvolviĝon. Precipe post la granda antaŭensalto en 1958, la fera kaj ŝtala produkto havis novan disvolviĝon. En 1960, kamarado Maŭ Zedong persone ellaboris la “Ĉarton de Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio”*, kaj poste faris la alvokon “**Lerni de Daking en industrio**”, kio elvolvis vastan perspektivon por la fera kaj ŝtala industrio kaj aliaj industrioj de nia lando.

Nun nia lando jam havas kelkajn grandajn ferajn kaj ŝtalajn bazojn en Anŝan, Vuhan, Baŭtoŭ, Ŝanhajo, Pekino k.a. lokoj kaj ankaŭ konstruis nombron da mezgrandaj kaj malgrandaj feraj kaj ŝtalaj kombinoj en la tuta lando. Tiuj kombinoj jam povas produkti ordinarajn malaltajn alojajn ŝtalojn, rustimunajn ŝtalplatojn, malvarme laminatitajn ŝtalplatojn k.s. Nia lando jam povas fundamente mem provizi al si la ŝtalajn materialojn bezonatajn en fabrikado de aŭto, traktoro, granda ponto, havena kajo, preciza mezuraparato kaj en petrolkemia kaj aliaj industrioj. Ankaŭ la tekniko akiris rimarkindan altiĝon. LD-procedo, vakua fandado, kontinua ingotado k.a. novaj teknikoj estas iom post iom disvastigataj.

I

En la periodo de socialisma konstruado de nia lando, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ elmetis kaj multfoje emfazis kompleton da principoj pri “irado per la du kruroj”, nome samtempa disvolvo de industrioj gvidataj de la centra registaro kaj tiuj gvidataj de lokaj instancoj kaj samtempa disvolvo de grandaj entreprenoj kaj mez-kaj mal-grandaj en-


treprenoj, montrante klaran direkton al ĉiufanka disvolvo de nia industrio.

En la lastaj jaroj, pli ol 300 gubernioj kaj urboj de nia lando konstruis malgrandajn fabrikojn de fero kaj ŝtalo. La rapideco de disvolviĝo de produktopovo de loka fera kaj ŝtala industrio kaj multeco de specoj de ties produktaĵoj estas senprecedencaj. Laŭ nekompleta statistiko en 1970 la povo de ferfandado de malgrandaj feraj fabrikoj 2.5-obliĝis kompare kun tiu en 1969 kaj la kvanto de gisfero 2.8-obliĝis.

Kompare kun grandaj entreprenoj, mezgrandaj kaj malgrandaj entreprenoj bezonas malmultan investon kaj povas rapide komenci produktadon; ili povas esti konstruataj ne nur de provincoj kaj urboj, sed ankaŭ de gubernioj kaj popolkomunumoj. La regionoj kaj gubernioj Jantaj de Ŝandong-provinco, Fengĉeng de Gianghi, Ginĉeng

de Ŝanhi k. a. jam starigis malgrandajn ferajn kaj ŝtalajn kombinumojn. La disvolviĝo de la malgrandaj entreprenoj liveris grandan kvanton da materialoj por fabrikado de agrikulturaj maŝinoj, prilaboraj maŝinoj por agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj, agrikulturaj instrumentoj k.a. kaj forte akcelis la disvolviĝon de lokaj industrioj. En 9 el la 11 regionoj de Gansu-provinco, kies fera kaj ŝtala industrio estis relative postĝinta, jam fondiĝis malgrandaj feraj kaj ŝtalaj fabrikoj kaj produktis grandan kvanton da gisfero kaj certan kvanton da ŝtalingotoj. Du el tiuj regionoj jam povas fundamente kontentigi la bezonon de ili mem pri gisfero. Samtempe kun la disvolvado de malgrandaj feraj kaj ŝtalaj fabrikoj, Gansu-provinco starigis ankaŭ 13 mez- kaj malgrandajn ferminejojn kaj koaksopreparejojn, per kiuj ĝi povas fundamente kontentigi la bezonon de tiuj materialoj

Fera likvaĵo transportata al ŝtala fabriko de la Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio




de la malgrandaj altfornoj en la tuta provinco.

La malgranda fera kaj ŝtala fabriko de Fengceng-gubernio konstruis en 1970 ŝtalfandejon de Bessemer-fornego kun jara produktopovo de 20,000 tunoj kaj per tio faris novan kontribuon al la fera kaj ŝtala industrio.

II

Fera erco kaj aliaj helpaj ercoj estas “nutraĵo” de fera kaj ŝtala industrio. Por disvolvi ŝtalan industrion, oni devas antaŭ ĉio konstrui minejojn. En nia lando, disvolvante la feran kaj ŝtalan industrion, oni ankaŭ komencis konstruadon de minejo. Sed antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en metalurgiaj departementoj elmetis la absurdajn teoriojn “konstrui fabrikojn sed ne minejojn”, “prefere aĉeti ercojn ol ekspluati minojn”, kio baris konstruadon de minejoj kaj serioze influis la disvolviĝon de fera kaj ŝtala industrio. Laboristoj indigne diris: “Se fera kaj ŝtala kompanio aĉetas ercojn, tio similas al almozulo kun ora bovlo.”

Nuntempe, grandskala amasa movado por ekspluati minojn disvolviĝas tra la tuta lando. La produktokvanto de fera erco de la tuta lando en 1970 estis 48% pli multa ol tiu de 1969 kaj tiu de la unuaj kvin monatoj de la kuranta jaro estas 35% pli multa ol tiu de la sama periodo de la pasinta jaro. Samtempe kun tio rapide altiĝis ankaŭ la produkta povo de



La revoluciaj laboristoj de la Tajjuan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio kreis procedon de ŝtala rafinado sen oksigeno kaj produktas bonkvalitan ŝtalon.

la ercoelektejoj kaj sintrejoj kaj produkta nivelo de la helpaj materialoj kaj koloraj metaloj.

La vastaj amasoj de laboristoj de la Benhi-a Fera kaj Ŝtala Kompanio plupaŝe ekspluatis la latentan forton de la malnovaj minejoj, kompletigis la sistemon de elfosado, elektado kaj sintrado de erco kaj ekvilibrigis la produkton de fera erco kaj tiun de helpaj materialoj, tiel kontentigis la bezonojn de altforna produktado kaj kreis avangardan sperton por la grandaj feraj kaj ŝtalaj entreprenoj de nia lando en



Ferminaj laboristoj de Jantaj-regiono faras amasan teknikan renovigon kaj per tio levis la transportan povon de erco.

efektivigo de memprovizo de ercoj. Samtempe kun la konstruado de grandaj minejoj, la Metalurgia kaj Mina Kompanio de Handan de Hebej-provinco alte taksis la kombiniĝon de ĝi kun la malgrandaj minejoj funkciigataj de gubernioj kaj komunumoj, lernas unu de alia, akcelas kaj helpas unu alian, kio pliapaŝe firmigis la aliancon inter la laboristoj kaj kamparanoj. Nun krom la granda, mezgrandaj kaj malgrandaj minejoj de la kompanio, 35 malgrandaj ferminejoj jam estas starigitaj de amasoj de gubernioj kaj komunumoj. Sub la kondiĉo ne malhelpi la agrikulturan produkton, tiuj malgrandaj ferminejoj jam produktis, en la lastaj jaroj, pli ol 3,000,000 tunojn

da erco, per kio ili kaj subtenis la konstruadon de la ŝtato kaj pligrandigis la kolektivitan akumulon kaj la enspezon de la komunumanoj. Ankaŭ en Giangsu, Gianghi, Ĝegiang, Ŝandong, Siĉuan, Anhuĵ, Ŝanhi kaj Guangdong konstruiĝis granda nombro da mezgrandaj kaj malgrandaj ferminejoj kaj minejoj de helpaj materialoj kiaj kalkŝtono kaj argilo.

En julio de 1970, konstruiĝis en Pekino la unua ercoelekto de nia lando, kiu aplikis novan teknologion de senperila seka muelado kaj seka elektado. La fabriko produktis norman ercopulvoron, kio signis novan progreson de la ercoelekta tekniko de nia lando.

III

La problemon de konstrua investo, bezonataj teknikistoj kaj maŝinoj por disvolvado de nia fera kaj ŝtala industrio ni solvis ĉefe nin apogante sur niaj propraj fortoj, same kiel tiun en aliaj industrioj. Kompreneble, en socialisma konstruado de nia lando, ni bezonas teknikan interŝanĝon kaj kunlaboron kun socialismaj landoj kaj amikaj landoj, lernadon de progresintaj teknikoj kaj sperto de aliaj landoj. Tiel ni agas nun kiel en la pasinteco. Sed nia starpunkto estas: plene utiligi niajn riĉfontojn kaj enlandan akumulon de kapitalo, por disvolvi la feran kaj ŝtalan industrion kaj ĉiujn aliajn aferojn laŭ la konkretaj kondiĉoj de nia lando, disvolvante la spiriton de sinapogo sur la propraj fortoj, sur la diligenta laboro de la popolo kaj disvolvante la saĝon de la popolo.

La rulaĵoj de malvarme laminatita silicia ŝtalplato ekspoziciita en la Kantona Foiro de Eksportaj Varoj de Ĉinio estas produktitaĵoj de la malvarma laminatejo de la Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio.

La rulaĵo de malvarme laminatita silicia ŝtalplato bezonas longan produktan periodon kaj multajn ekipaĵojn. La teknologio en ĝia produkto estas tre komplika, kaj

krome, la procedo de altvarma hidrogena trakto estas iom danĝera, tial la produkto de tia ŝtalplato estis monopolata de malmultaj imperiismaj landoj.

Niaj metalurgiaj laboristoj decidis fari provon. En 1965, laboristoj de malvarma laminatejo de la Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio ellaboris projekton pri produkto de tia ŝtalplato. Post solvo de la ŝlosila problemo en produkto je la komenco de 1970, ili sukcesis produkti rulaĵojn de malvarme laminatita silicia ŝtalplato.

La unua, dua kaj tria feraj kaj ŝtalaj fabrikoj de Ŝanhajo iras la vojon de sinapogo sur propraj fortoj kaj rapide multigis la specojn de ordinaraj malaltaj alojaj ŝtaloj. Nun tiaj ŝtaloj atingis pli ol 80 specojn kaj la kvalito estas bona. Post peniga laboro de pli ol 10 monatoj, laboristoj de la Ŝanhaja Kvina Fera kaj Ŝtala Fabriko, post atenta provado, sukcesis laminati per mezgranda laminatilo gravajn novajn produktaĵojn,

kiujn produktis iuj landoj per 10,000-tuna hidraŭlika premaŝino. La dua Bessemerfandejo de la Ŝanhaja Unua Fera kaj Ŝtala Fabriko nun povas fandi veldŝtalon, agrikulturilan ŝtalon k. a. sume 47 specojn de ŝtalo. Ĝia jara produkta kvanto superas 70-oblon de la plej alta jarprodukto de la tuta Ŝanhajo antaŭ la Liberiĝo.

Nun la vastaj amasoj de metalurgiaj laboristoj batalas kun revolucia heroismo por efektivi la unuajaran planon de fera kaj ŝtala produkto de la Kvara Kvinjara Plano de nia lando.

**“La Ĉarto de Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio” estas instrukcio de kamarado Maŭ Zedong en marto de 1960. La esenco de la instrukcio estas: persiste komandi ĉion per politiko, plifortigi la gvidon de la Partio, vaste disvolvi amasan movadon, efektivi la sistemon ke kadroj partoprenas en laboro kaj laboristoj partoprenas administradon, reformon de neraciaj regularoj kaj triflankan kombiniĝon de kadroj, laboristoj kaj teknikistoj, kaj energie disvolvi teknikan renovigon kaj teknikan revolucion.*

Antaŭ Bessemer-fornejo



Ĉinio Kreis

Akupunkturan

Anestezon

EN tiu ĉi artikolo ni raportos al vi per kelkaj ekzemploj, kiel niaj medicinaj laborantoj faras operaciojn per akupunktura anestezo.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **“La medicino kaj farmacio de Ĉinio estas granda trezorejo. Oni devas klopodi por esplori ilin kaj levi ilin al pli alta nivelo.”** La ĉinaj medicinaj kaj sciencaj laborantoj respondis al tiu ĉi granda alvoko. Kombinante revolucion spiriton kun scienca sinteno kaj aplikante modernajn sciencajn sciojn kaj metodojn, ili resumis kaj sistemigis la sperton de la ĉina tradicia medicino pri ĉesigo de doloro kaj kuracado per akupunkturo kaj sukcesis krei la novan anestezan metodon.

Kiam oni anestezas per akupunkturo, oni pikas per unu aŭ pluraj pingloj je certaj punktoj en la membrojn, orelojn, nazon aŭ vizaĝon de la paciento kaj atingas sendolorigon post certa tempo de indukto kaj stimulo, por ke operacioj povu esti farataj sekure al kapo, brusto, abdomeno aŭ membroj. Tiu ĉi anesteza metodo estas nun aplikata en multaj civilaj kaj armeaj hospitaloj kaj kuracejoj en nia lando. Grandaj nombroj da klinikaj kazoj montris, ke la metodo estas sekura, simpla, ekonomia kaj efika. Akupunkturan anestezon en ĥirurgiaj operacioj jam ricevis pli ol 400,000 pacientoj en nia lando, inkluzive de beboj kelkmonataj kaj maljunuloj kun aĝoj de 70-80 jaroj. La sukcesa procento estas ĉirkaŭ 90%. Niaj revoluciaj sciencistoj kaj medicinaj laborantoj nun serioze resumas la akiritajn spertojn por forigi ankoraŭ ekzistantajn mankojn de la metodo kaj ĝin plibonigi komplete.

La Red.

En hela operaciejo, medicinaj laborantoj de la Pekina Hospitalo de Laboristoj, Kampanoj kaj Soldatoj kaj la Tuberkuloza Instituto de Pekino estis farantaj operacion de reformo de brusto al la paciento Hu Ŝuhjuan, suferanta de pusa brusto.


En la ĉambro ne vidiĝis peza kaj kompleksa aparato por anestezo, ne flariĝis intensa

odoro de narkotaĵo. Iu medicina laboranto pikis oreleon de Hu Ŝuhjuan per du arĝentaj pingloj, delikate turnadis ilin ĉirkaŭ 20 minutojn kaj tiam oni komencis la operacion, dum la paciento estis en klara konscio.

Antaŭ 5 jaroj, Hu Ŝuhjuan eksuferis de pusa brusto pro infekto post operacio. Puso kaj sango fluadis tutjare el lia brusto tra

fistulo. Por forigi puson kaj plenigi la kavon, necesis fari operacion denove. Sed kun tre malforta korpo kaj malbone funkciantaj koro kaj pulmoj, Hu Ŝuhjuan ne povis elteni la inciton de anesteza drogo necesa por operacio. Kelkfoje post tutkorpa anestezo aperis ĉe li la danĝera stato de malbona funkcio de la koro. Poste oni aplikis al li duonkorpan kaj partan anestezon, kaj tamen ne povis fari la operaciojn ĝisfine, pro manko de necesa sendolorigo. Malsukcesis ĉiuj 24 grandaj kaj malgrandaj operacioj faritaj al li, kaj lia sanstato fariĝis ĉiam pli malbona.

Ĉifoje li ricevis akupunktur-anestezon. Dum la operacio, oni devis tranĉe malfermi al li cikatroplenan haŭton, amputi ses ripojn, fortondi la nove elkreskintajn ostojn post la operacioj kaj purigi grandan pusokavon. La malfacileco de tiu operacio kaj ĝia ekscito al la paciento estis multe pli grandaj ol tiuj de la antaŭaj. Dum la du kaj duona horoj de operaciado, Hu Ŝuhjuan ĉiam restis trankvila kaj esperplena, lia sangpremo kaj pulso ĉiam restis stabilaj kaj eĉ la bruo de tranĉado de liaj ostoj ne maltrankviligis lin. Je la komenco de la operacio, Hu Ŝuhjuan sentis, ke io faris strekon sur lia brusto. Fakte la ĥirurgo tranĉis lian cikatroplenan haŭton. Tranĉante liajn ripojn per certaj, ĝustaj, malpezaj kaj rapidaj movoj, la ĥirurgo diris al li zorgeme: “Se vi sentas malkomforton, tuj diru al ni.” Hu Ŝuhjuan



Medicinaj laborantoj de la Tuberkuuloza Instituto de Pekino faras al iu paciento operacion de pulmoamputo, aplikante akupunktur-anestezon.

diris: “Mi sentas min tre bone. Daŭrigu sentime!”

Kun profunda proletara sentimento, la medicinaj laborantoj forigis por Hu Ŝuhjuan la puson, ŝtopis la kavon kaj fistulon kaj plenumis la operacion tre sukcese.

En la pasinteco, Hu Ŝuhjuan suferis de kapturniĝo, palpacio, malbona apetito kaj malbona dormo dum pluraj tagoj post



Medicinaj laborantoj de Ŝanhajo esploras pli efikajn pikpunktojn kaj novan incitan metodon.

operacio, kaŭze de apliko de narkotaĵo. Kelkfoje li estis sufokita de mukaĵo, kiu ŝtopis lian gorĝon kaj ne povis esti elkraĉita de li post operacio. Tiam la ĥirurgoj devis tranĉe malfermi lian gorĝon por lin savi per enflugo de oksigeno. Pro la malrapideco de refortiĝo, li nur povis ellitiĝi ĉiufoje tri semajnojn post la operacio. Sed ĉifoje tute malsame fariĝis al li dank' al apliko de akupunktura anestezo. Post la operacio, okazis al li nek palpitacio, nek spirmankeco, nek multeco de mukaĵo; li povis preni manĝaĵon jam en la tago de la operacio kaj ellitiĝi por promeno jam en la tria tago post ĝi. La aparatoj kaj medikamentoj, kiujn la medicinaj laborantoj pre-

tigis por venki akcidenton dum la operacio, ĉiuj montriĝis senbezonaĵoj.

Ĉar akupunktura anestezo ne bezonas kompleksan aparaton, ne estas limigata de la kondiĉoj de ekipaĵoj, klimato kaj loko, ĝi povas esti disvastigata en urboj, kaj precipe taŭgas por apliko en montregiono, kamparo kaj militaj cirkonstancoj.


La kuracejo de Luogia-komunumo, Nanĉang-gubernio, Gianghi-provinco, havas nur malmulte da simplaj ekipaĵoj kaj ĝiaj kuracistoj estas plejparte elektitaj el la "nudpiedaj" kuracistoj de la produktaj brigadoj. Sed tre bone iris en ĝi akupunktura anestezo. Je la fino de la pasinta jaro, kuracisto de

tiu kuracejo faris gastroamputon al paciento de stomaka ulcero, aplikante akupunkturan anestezon. La paciento Van Dingli estis malriĉkamparano kun aĝo de 55 jaroj. Trankvile li kuŝis sur la operacia stablo kun kelkaj pingloj sur la oreloj. Juna kuracisto Van Taŭgeng lerte tranĉis lian abdomenon, malfermis ĝin kaj komencis zorgan esploron. Li trovis, ke la ulcera parto de la stomako jam gluiĝis al la posta peritoneo. Li disigis ilin per delikata movo kune kun sia asistanto kaj sukcese desekcis la plejparton de la stomako kaj faris gastroenterotomion. Dum la 2 horoj kaj 45 minutoj de la operaciado, la paciento ĉiam restis trankvila kun normaj spirado kaj pulsado. Li sentis iom da malkomforto, nur pro ektiro de liaj internaĵoj, kiam oni disigis la duodenan bulbon. Van Taŭgeng petis, ke li faru profundajn spirojn, kaj tiam

tuj mildiĝis la malkomforto. Post la finiĝo de la operacio, Van Dingli mem surmetis siajn vestojn, descendis la stablon kaj revenis al la malsanula ĉambro. Kun rida mieno li diris al la medicinaj laborantoj: "Dankojn al vi, ke vi ŝavis min de la multjara stomaka ulcero." La ĉeestantaj rigardantoj diris, ke ili ne kredus, ke li estas ĵus ricevinta abdomenan operacion, se ili ne tion vidus propraokule. Van Dingli forlasis la kuracejon je la 9-a tago post la operacio kaj post tri-monata ripozo li jam povis partopreni fizikan laboron de plantado, rikoltado ktp.

Nun tiu kuracejo jam povas fari pli ol 20 specojn de ordinaraĵoj aplikante akupunkturan anestezon per pikado sur la korpo, orelo aŭ nazo. Pli ol 90 procentoj de iliaj kazoj sukcesis.

Medicinaj laborantoj de iu hospitalo de la kantonaj trupoj faras al paciento detranĉadon de plejparta stomako kaj gastroenterotomion.



La kuracejo de Bajŝa-komunumo de Bajŝa-gubernio de la Hajnan-a Aŭtonoma Subprovinco de Lioj kaj Miaŭoj, Guang-dong-provinco, ne povis fari eĉ malgravan operacion en la pasinteco. Nun ĝiaj kuracistoj jam povas fari multajn operaciojn kiel desekcadon de gala veziko, plejparto de stomako kaj tiroida tumor, dank' al apliko de akupunktura anestezo. En la pasinteco, por sendi pacienton al hospitalo de la subprovinco aŭ de Kantono por fari desekcon de gala veziko, oni devis elspezi

centojn da juanoj, sed nun oni bezonas pagi nur dekelkajn juanojn por fari tian operacion ĉeloke per akupunktura anestezo.

En la pasinta duonjaro, la kuraca trupo sendita de la Ĝenerala Hospitalo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo al la kamparo de Ŝanhi-provinco sukcese faris pli ol 9,000 diversajn operaciojn aplikante akupunkturan anestezon, en kamparaj kuracejoj aŭ hejmoj de komunumanoj. Ĝia oportuna servo al la amasoj estas varme bonvenigata de ili.



Medicinaj laborantoj de la ĝenerala hospitalo de ĈPLA serĉas pik-punktojn sur sia propra korpo plej efikajn por kuraco.



Akupunkturo

EN tiu ĉi numero, ni aperigis artikolon pri akupunktura anestezo, kiu prezentas aspekton de la nova disvolviĝo de nia tradicia medicino kaj novan sukceson atingitan de niaj medicinistoj en firma efektivigo de la revolucia higiena linio de Prezidanto Maŭ kaj tutkora servado al la popolo.

Akupunkturo estas unu el la tradiciaj kuracmetodoj de nia lando. Frue, en ŝtona epoko, niaj praaĵoj jam eltrovis la kuracan metodon de pikado al la haŭto per ŝtona pinglo. En la moderna han-a lingvo oni ankorau uzas la vorton “*zhenbian*” (pikkuraci) en la senco “kuraci”. Post la eltrovo de metalo, tiu kuraca metodo disvolviĝis en akupunkturon. En la komenco, oni uzis feran pinglon kaj poste faris ĝin el arĝenta alojo, tial nun oni ĝenerale nomas la pinglojn uzatajn en akupunkturo “arĝentaj pingloj”, kvankam efektive ili estas faritaj el rustimuna ŝtalo aŭ aliaj alojaj ŝtaloj kun bona elasteco.

Plej fruan noton pri akupunkturo oni trovas en la antikva medicina verko *Nejĝin*, kiu laŭ esploro estis kompilita dum la Epoko de Militantaj Regnoj (476-221 a. K.). Do antaŭ la dua jarcento a. K. akupunkturo jam estis vaste aplikata. De tiam

ĝi senĉese disvolviĝis, kaj en la sesa jarcento ĝi jam fariĝis fako en la medicina eduko de nia lando.

En tiu terapio, 9 specoj de pinglo estis uzataj en la antikveco, sed nun ofte uzataj estas nur du specoj, nome la trieĝa kaj la ronda, precipe la lasta. La trieĝa pinglo estas uzata nur por ellasi sangon per ekpiko. La longeco de la rondaj pingloj varias de 2.1 ĝis 10.5 centimetroj laŭ la profundeco bezonata en pikado. Ilia dikeco plej ofte uzata varias inter 0.2 kaj 0.4 milimetro.

La pikataj punktoj diferencas laŭ malsamaj malsanoj. Iuj el ili proksimas al la malsana loko, dum aliaj troviĝas for de ĝi. La pikpunktoj dislokiĝas laŭ la linioj de *ĝinluo*, sur kiu baziĝas la ĉina medicino. Laŭ la teorio de *ĝinluo*, sin trovas 14 *ĝin*-oj (en direkto supren kaj malsupren) kaj 15 *luo*-oj (en direkto inversa al la *ĝin*-oj). La *ĝin*-oj kaj *luo*-oj interligiĝas, formante la tutan sistemon de *ĝinluo*, kiu kontaktigas la eksteron kaj la internon de la homa korpo. La pikpunktoj ĉiuj troviĝas sur la *ĝin*-o aŭ *luo*-o koncernanta al la malsana korpoparto.

Laŭ antikvaj medicinaj verkoj, sin trovas 365 pikpunktoj

sur la homa korpo por kuraci malsanojn. Sed ofte uzataj estas nur 130 sen enkalkulo de la simetria punktoj sur la alia flanko de la homa korpo. Novajn punktojn oni trovis poste unuj post aliaj kaj en Ming-dinastio (1368-1644 p. K.) ilia nombro atingis 359.


Ankaŭ la pikmaniero varias laŭ la kuracataj malsanoj. La pinglojn oni laŭbezzone enpuŝas vertikale, oblikve aŭ horizontale kaj poste ilin movas diversmaniere. En la antikveco, oni movis en ok manieroj. Unuvorte, oni difinas la profundecon kaj angulon de enpuŝo, la direkton de turnado kaj la rapidecon kaj la fortecon de la ripetadaj pliprofundiĝoj kaj retiroj de la pingloj laŭ la stato de la malsano kaj la korpo de la paciento, por ke li ricevu la sentojn de acideco, elektrofrapo, ŝvelpremiĝo aŭ pezo necesajn por resanigo.

Tiu ĉi terapio povas kuraci multajn ordinarajn kaj oftajn malsanojn. Escepte de malignaj haŭtaj malsanoj, akuta peritoneito, gangreno, hemofilio, septicemo, sifiliso k.s., ĝi havas kuracifikon ĝenerale por ĉiuj malsanoj, precipe ĝia efiko por neŭrozo estas bonega kaj rimarkinde bona ankaŭ por inflamaj malsanoj.

Akupunkturo estas tre bonvena al la laboranta popolo, ĉar tiu terapio ne bezonas kompleksajn instrumentojn kaj ekipaĵojn kaj estas aplikebla ĉiam kaj ĉie, kun rapida efiko kaj malmulta kosto. Sed en la malnova duonkolonia Ĉinio, la reganta burokrata kompradora klaso antaŭenpuŝis la politikon de adoro al la okcidenta medicino kaj malestimo al la medicinaj heredaĵoj de la patrolando. Ankaŭ la akupunkturo estis malestimata, subpremata kaj kalumniata kiel "postiĝinta" kaj "nescienca".

Koncerne al la disvolvo de la medicino kaj farmakologio de nia lando, Prezidanto Maŭ jam antaŭ longe montris, ke la kuracistoj de la okcidenta medicino kaj tiuj de la ĉina medicino devas unuiĝi kaj kunlabori por krei unuecajn novajn medicinon kaj farmakologion de Ĉinio, ordigante kaj esplorante la ĉinajn medicinon kaj farmakologion per scioj kaj metodoj de la modernaj sciencoj. Sub la direktado de tiu spirito, ankaŭ akupunkturo certgrade estis revivigita kaj apli-

kata; sed ĝi ricevis altan takson kaj veran disvolviĝon (legu EPĈ, 1970, n-ro 3, p.44) nur post kiam la kompradora filozofio de la renegato Liu Ŝaŭki estis likvidita en la Granda Proletara Kultura revolucio. En la lastaj jaroj, tiu terapio estis aplikata en kuraco de surdmuteco, paralizo, poliomjelita sekvaĵo, psikozo kaj aliaj "nekuraceblaj" aŭ "malfacile kuraceblaj" malsanoj kaj ricevis mirindajn sukcesojn. Aplikante la dialektikan penson de Prezidanto Maŭ lernitan el la verko *Pri Kontraŭdiro* en analizado de uzataj pikpunktoj, la vastaj amasoj de medicinistoj reduktis ilian nombron kaj disvolvis la aplikeblecon de iuj pikpunktoj. Ekzemple, la akupunktura anestezo rezultigis el la disvolvo de la akupunktura sendolorigo. Samtempe, kun la spirito tutkore kaj tutanime servi al la popolo, ili faris eksperimentojn de pikado sur sia propra korpo kaj trovis pli ol cent novajn pikpunktojn por kuraci certajn malfacile kuraceblajn malsanojn kaj faris gravan kontribuon por la disvolvo de tiu terapio.



Strukturo de argenta pinglo



Trieĝa pinglo kaj maniero por ĝin teni.



ABUNDA RIKOLTO DE JUNAJ CERVOKORNOJ

La gubernio Ŝuangjang de Gilin-provinco estas unu el la produktetoj de junaj cervokornoj de nia lando kaj ĉijare ĝi akiris abundan rikolton de tio. La kvanto de akiritaj kornoj estas je 20% pli multa

ol tiu en 1970 kaj la junaj cervokornoj venditaj al la ŝtato, inter kiuj 80% estas unuaklasaj, valoras pli ol 600,000 juanojn.

Juna cervokorno estas tre valora medikamento en la ĉina medicino. Ĝi estas neostiĝinta juna korno de masklaj cervo kaj ruĝa cervo. La gubernio Ŝuangjang havas tradicion de cervobredado. Post la fondiĝo de la gubernia revolucia komitato, samtempe kun disvolvo de grena produkto, oni plene utiligis la favorajn kondiĉojn de montregiono, multe generigis cervojn. Nun la gubernio starigis 4 ŝtatajn cervobredejojn kaj ĝiaj 15 popolkomunumoj entreprenis cervobredadon.

Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong

358 pĝ. 12.8 × 9 cm. kun ruĝa plasta kovrilo

Celebre al la 50-a Datreveno de la Komunista Partio de Ĉinio

La redakcioj de la ĵurnalo *Renmin Ribao*, la
gazeto *Hongqi* kaj la ĵurnalo *Jiefangjun Bao*

(En Esperanto)

12.8 × 9 cm. broŝurita

Aĉetu ilin ĉe niaj diverslandaj perantoj
aŭ rekte ĉe la Libroservo de ĈEL.

Eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio
Distribuas la Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo
P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Esperantaj Poŝtkartoj

Kun koloraj bildoj Formato: 10 × 15 cm.

**La Ruĝa Signal-lanterno (revolucia moderna
pekinopero)**

Serio de 12 kartoj

**Sagaca Kapto de la Tigromonto (revolucia
moderna pekinopero)**

Serio de 16 kartoj

**Ruĝa Virina Taĉmento (revolucia moderna
baleto)**

Serio de 12 kartoj

Ŝagiabang (revolucia moderna pekinopero)

Serio de 14 kartoj

De samaj eldoninto kaj distribuantoj kiel supre

La Ĉefurba Sporta Halo


LA Ĉefurba Sporta Halo de nia lando estas projektita, konstruita kaj ekipita de niaj laboristoj kaj teknikistoj en la Granda Proletara Kultura Revolucio. Por tion fari oni uzis nur malpli ol du jarojn. En ĝia konstruado, la laboristoj disvolvis la kolektivajn saĝon kaj kreemon, laŭ la karakterizaj kaj konkretaj kondiĉoj de nia lando. Ekzemple, por la konstruo de la tegmento de la halo, oni aplikis la strukturon de plata retruso kun larĝeco de 99 metroj kaj longeco de 112 metroj. Ĝia konstruado postulis altan teknikon, eĉ por fikso de la pli ol 20,000 fortegaj ŝraŭboj neniam eraro estis permesata. La laboristoj kaj teknikistoj tamen plenumis la muntadon nur en 55 tagoj. Tia tegmento bezonas malpli multe da ŝtalo, malpli multe

kostas kaj estas pli rapide konstruebla. La fridiga ekipaĵo de la glacia glitkurejo alprenis sistemon de rekta provizo de amoniako. Ĝia sukcesa konstruo estas kristaliĝo de la revolucia entuziasmo kaj scienca spirito de la laboristoj kaj teknikistoj de nia lando. Praktika uzado pruvis, ke la ekipaĵo atingis la projektan postulon kaj havas bonan fridigan efikon.

Tiu alta kaj vasta sporta halo okupas terspacon de ĉirkaŭ 7 hektaroj kaj ĝia konstrua areo estas pli ol 40,000 kvadrataj metroj. La halo longas 122 metrojn, larĝas 107 metrojn kaj altas pli ol 28 metrojn. Krom la konkursa halo, ĝi havas tri ekzercejojn, ripozejojn por rigardantoj, maŝinejon k. a., kaj krome ĝi havas ankaŭ ekipaĵojn por


Maĉo de volano





Mačo de korbopilko

Gimnastiko sur saltĉevalo



radiatora sistemo, akvokonduka sistemo, kloako, lumiga sistemo kaj reguliga sistemo de aero.

En la konkursa halo troviĝas pli ol 18,000 sidiloj. Oni povas fari en ĝi diversajn sportajn aktivadojn inkluzive de tiuj de tabloteniso, volano, volebalo, korbopilko, glaci-hokeo, glitkurado sur glacio kaj gimnastiko. La konkursa placo longas 88 metrojn kaj larĝas 40 metrojn. Ĉar parto de la spektatoraj sidiloj estas moveblaj aŭ duone fiksitaj, la konkursa placo povas varii laŭ bezono de diversaj sportaj aktivadoj. Por fari grandskalan konkurson tablotenisan, la placo povas enteni samtempe 24 ludotablojn. Ankaŭ la antaŭa parto de la prezida podio povas aŭtomate leviĝi, malleviĝi aŭ moviĝi en aliajn direktojn. Sur la orienta kaj okcidenta muroj de la konkursa halo, instaligis elektraĵ poent-registriloj kaj horloĝoj por montri la gajnitajn poentojn de la konkursantoj kaj la konkursan tempon. Tiuj aparatoj estas direktataj de la juĝa ĉambro. La planko de la konkursa halo konsistas el 19 moveblaj lignaj pecegoj kaj sub ĝi estas glacia glitkurejo. Per aparta mekanika sistemo, la plankaj pecoj povas esti movitaj orienten kaj aŭtomate metiĝi en la tenejojn unu post alia. Kiam la ligna planko estas formovita, tiam aperas sub ĝi la planko el artefarita

marmoro. Por formi sur ĝi glacian glitkurejon, sufiĉas verŝi akvon sur ĝin kaj glaciigi la akvon per la fridiga sistemo. La temperaturo de la glacia surfaco estas stabila en ĉiu ajn sezono. En somero, la spektatoroj povas rigardi glaci-hokean konkurson en ĉemizo kaj ĝui malvarmeton en la halo, dum en vintro tie estas varme kiel en printempo.

Ankaŭ la disaŭdiga sistemo kaj akustika aranĝo de la Ĉefurba Sporta Halo estas zorge projektitaj tiel ke ĉe ĉiu ajn sidilo oni povas tre klare aŭdi parolojn el la laŭtparoliloj. La halo havas ankaŭ siajn ĉambrojn por radiodisaŭdiga kaj televida servoj.

Post la finkonstruo de la halo, en la 25-a de januaro de 1969, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin Biaŭ akceptis en ĝi pli ol 40,000 revoluciajn batalantojn el diversaj lokoj de la tuta lando. De la pasinta jaro, sportaj teamoj de pli ol dek landoj faris en ĝi amikajn konkursojn de tabloteniso, korbopilko, volebalo, volano ktp. kun ĉinaj sportistoj.

Kaj en novembro de la kuranta jaro, okazos en ĝi la Tablotenisa Invita Amika Konkurso de Azio kaj Afriko.

Lumo-reguliga ĉambro










3

Ĉinaj kaj vjetnamaj
tablotenisistoj marŝas
en la konkursan ha-
lon.



Ĉinaj kaj koreaj sportistoj amike interparolas kaj interŝanĝas sperton en pilkludo.




Tia trinkejo estas instalita en ĉiu ri-pozejo de la sporta halo.

Amikeca volebala konkurso



Unu el la bufedoj en la sporta halo





Sur la glacia glitkurejo en la konkursa halo

JI BING:

Lusin

LA 25-a de septembro de 1971 estas la 90-a datreveno de la naskiĝo de Lusin, granda literaturisto, pensulo kaj revoluciulo de nia lando.

La vera nomo de Lusin estas Ĝou Ŝufen. Li naskiĝis en la gubernio Ŝaŭhing de Ĝegiang-provinco, 1881, ĉirkaŭ 40 jarojn post la Opia Milito (1840-1842)¹. Tiu-tempe la imperiistoj estis pliintensigantaj agresadon kontraŭ nia lando. Pro la humilaĉa cedado de la putra registaro de King-dinastio antaŭ imperiismaj invadoj, Ĉinio proksimiĝis al pereco kaj la feŭda socio turniĝis en socion duonfeŭdan kaj duonkolonian.

Dum sia infanaĝo Lusin ofte loĝis ĉe la avino de patrino flanko en kamparo, tial li havis la ŝancon bone koni la kamparan vivon, kaj vidi, el la suferoj de la kamparanoj, la maljuston kaj mallumon de la socio. Tio havis rektan influon al lia posta skribado de kontraŭfeŭdaj noveloj kaj aliaj literaturaj verkoj.

Kun la volo de strebado al la vero Lusin iris al Nankino por lerni en senpaga lernejo, kiu instruis fremdajn aferojn. En la 4 jaroj dum kiuj Lusin vivis en Nankino, Ĉinio spertis la gravajn eventojn de moderniga movado de 1898², la kontraŭimperiismaj bataloj de Jihetuan³ kaj la agreso de aliancaj trupoj de 8 imperiismaj landoj.



Lusin, la granda literaturisto, pensulo kaj revoluciulo

En tiu tempo la ĉina popolo troviĝis en kriza momento de vivdanĝero. Lusin decidis iri eksterlanden por lerni novajn sciojn kaj serĉi vojon de savo de la nacio. En la komenco de la jaro 1902, Lusin iris lerni en Japanio.

Tie li unue studis medicinon en Sendai. En la dua jaro, eksplodis la milito inter Japanio kaj Rusio. Hazarde Lusin vidis en la lernejo jenan scenon el projekciitaj bildoj: iu ĉino estas kaptita kaj ekzekutata de la japana armeo kiel spiono de la rusaj trupoj laŭ la klarigo, la ĉirkaŭe rigardantaj ĉinoj montras sin flegmaj. Lusin sentis akre en la koro, ke la medicino ne estas grava afero, kaj antaŭ ol oni havas konscion en la spirito, kaj ĝis tiu tempo kiel ajn forta korpo taŭgas nur por esti sensenca viktimo de ekzekutisto. Sekve, li decidis forlasi la lernadon de medicino kaj okupi sin pri literatura movado.

Somere de 1906, Lusin iris de Sendai al Tokio. En tiu tempo en Ĉinio la revolucia movado kontraŭ King-dinastio rimarkinde disvolviĝis. Dum la 7 jaroj en Japanio, Lusin partoprenis la revolucion movadon de la ĉinaj revoluciuloj loĝantaj en Japanio kontraŭ King-dinastio.

En 1909, Lusin revenis de Japanio al la patrolando. En 1911, eksplodis en Ĉinio la revolucio, kiu faligis King-dinastion. Lusin renkontis ĝin kun entuziasmo kaj aktive partoprenis kaj organizis propagandan agadon por ĝi en sia hejmloko Ŝaŭhing. Sed pro la kompromisemo de la burĝaro kiu gvidis la revolucion, la regpotenco falis en la manojn de la granda militaristo Juan Ŝikaj. Fiaskis la revolucio. Spertinte la malsukcesojn de la moderniga movado kaj la revolucio de 1911, li tute malesperiĝis pri la malnova demokratia revolucio gvidata de la burĝaro. Sed tiam la proletaro, la nova gvidanto de la ĉina revolucio, anko-

raŭ ne suriris la scenejon de la historio kaj Lusin estis tre afliktita pro netrovo de nova vojo por la ĉina revolucio.

En 1917, **“la kanona ektondro de la Oktobra Revolucio sendis al ni Marksismon-Leninismon”**. Sub la influo de la Oktobra Revolucio, en Ĉinio eksplodis la kontraŭimperiisma kaj kontraŭfeŭdisma Movado de la 4-a de Majo, en 1919. La ĉina revolucio eniris en la etapon de novdemokratia revolucio sub la gvido de la proletaro. Sur la kultura fronto formiĝis tute nova forto. Tiu nova kultura forto unuiĝis kun ĉiuj unuigeblaj aliancanoj kaj formis unuecan fronton, sub la direktado de Marksismo-Leninismo, kaj komencis heroan kaj intensan ofensivon kontraŭ la malnova kulturo de imperiismo kaj feŭdismo.

Kun nova fizionomio Lusin sin ĵetis en la batalajn vicajn kaj publikigis sinsekve en gazetoj kaj ĵurnaloj serion da noveloj inter

Parto el la verkoj de Lusin tradukitaj en aliajn lingvojn



kiuj estis *La Taglibro de Frenezulo, Kong Jigi, Medikamento, La Morgaŭo, Naskiĝloko, La Ĉefa Historio de A-Q, Beno* k. a. En la revoluciaj vicoj, Lusin de komence ligis konscie kompakte literaturon kun la revolucio. La ĉefaj figuroj en liaj noveloj plejparte estas laboruloj ekspluatataj kaj subpremataj en la duonfeŭda, duonkolonia socio. Priskribante ilian malfeliĉan staton, Lusin, plena de indigno, profunde malkaŝis la kruelecon de la feŭda klaso kaj feŭda ideologio kaj montris sian grandan simpatian al la subprematoj. Tio plene montras ke Lusin staris sur la flanko de la subpremata popolo. La profundeco en spegulo de la kamparana problemo kaj ĝisfundeco en opono kontraŭ feŭdismo, kiujn li atingis en siaj verkoj, estas senprecedencaj en la literaturaj verkoj de nia lando. En tiuj verkoj, per sia freŝa realismo, profunda pensenhavo kaj originala artformo, Lusin emociis la koron de junuloj kaj legantoj, efike stimulis la novdemokratian klerigan kampanjon, elhakis vojon por la revolucia, nova kulturo batalante kontraŭ la feŭda literaturo, kaj faris sin granda fondinto de la moderna literaturo de Ĉinio.

Krom noveloj, Lusin verkis ankaŭ eseojn kaj disertaĵojn, kiuj havis sian originalan stilon kaj atingis tre altan sukceson. Per tiu literatura armilo simila al ponardo aŭ ĵetlanko, li batalis ĝisfunde kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo kaj donis batojn al diversaspecaj malamikoj. En tiuj eseoj,



Lusin faris paroladon al amasoj en Pekino, 1929.

kiuj estis akraj kaj aŭdacaj, la pensenhavo havas tre klaran esprimon.

La 3-an de oktobro de 1927, Lusin venis al Ŝanhajo. Tiun centron de kultura batalo li elektis kiel sian militan bazon por fari literaturan kreadon kaj literaturan movadon. Li, unuflanke, batalis kontraŭ imperiismo kaj ĝia lakeo — la kuomintangaj reakciuloj kaj, aliflanke, soife studis marksisman teorion. Sub la reakcia regado, kiu ĵetis en malliberejon eĉ tiujn,



Lusin (en vitro de 1927, Ŝanhajo)

kiuj portis kun si libron kun ruĝa kovrilo, li vivon riskante luis anonime ĉambron por deponi verkojn de Marks, Engels, Lenin, Stalin k. a. Li ĉiam studis tiujn verkojn kun demandoj renkontitaj en bataloj. Kombinante la teorion kun la praktiko, li direktis sian revolucionan praktikon kaj eliminis la polvon de burĝaraj pensoj en sia animo per Marksismo. Li diris: “Efektive, mi ofte sekcas aliulojn, sed pli ofte mi senkompate sekcas min mem.” Pro tio ke li energie lernis Marksismon kaj aktive partoprenis la ardan amasan klasbatalon, fine li transformiĝis de revolucia demokrato en grandan komuniston.

La fondiĝo de la Unio de Ĉinaj Maldekstraj Verkistoj en 1930 markis novan stadion de la movado de ĉina revolucia literaturo kaj arto. Lusin estis kunfondinto kaj ĉefa gvidanto de tiu ĉi revolucia organizo. De tiam Lusin plenumis pli pezan taskon en la revolucia kultura fronto kaj havis pli intiman rilaton kun la popolo kaj la Komunista Partio de Ĉinio. Propraokule vidinte la agresadon de imperiis-

toj al Ĉinio kaj la subpremado al revolucio, forvendon de naciaj interesoj kaj masakron de laboruloj fare de kuomintangaj reakciuloj, Lusin montris pli klaran sintecon al la revolucio. Li senŝanceliĝe kredis, ke la malnovaj regantaj klasoj certe pereos. Li esperis la aperon de socialisma socio en Ĉinio kaj batalis por la apero de tiu “tute nova, vere senprecedenca sociordo”, por ke “la cent-milionojn nombranta popolo fariĝu la mastro de sia sorto”.

De post kiam la japanaj invadintoj pliintensigis kaj etendis sian agresadon kontraŭ nia lando en nordan Ĉinion, 1935, pli elstariĝis la kontraŭdiroj inter Ĉinio kaj Japanio kaj novaj ŝanĝiĝoj aperis en la rilatoj inter la klasoj en la lando. En la komplikaj cirkonstancoj de interkruciĝo de naciaj kaj klasaj kontraŭdiroj, Ĝoŭ Jang kaj similaj, kiuj uzurpis la gvidantecon de la Partio en la Unio, aktive sekvis la dekstreman kapitulacisman linion de Vang Ming kaj elmetis la sloganon de “nacidefenda literaturo”. Lusin travidis la reakcian naturon de la slogano,

kaj, surbaze de la politiko de kontraŭjapana nacia unueca fronto elmetita de kamarado Maŭ Zedong kaj kun la principeco kaj elasteco de Marksismo, elmetis la proletaran sloganon de “popolamasa literaturo de nacia revolucia milito”, kaj persistis en “memstareco kaj sendependeco en la unueca fronto”. La slogano de “popolamasa literaturo de nacia revolucia milito” defendis la gvidantecon de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la proletaro en la kontraŭjapana kultura fronto, donis pezan baton al la kapitulacisma linio de Vang Ming, Ĝou Jang kaj ilia kompanio. Tio plene montris la altan konscion de Lusin en mastrado de Marksismo kaj en plenumo de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

La lastaj jaroj de Lusin estis la kriza tempo de ekzisto aŭ pereco por nia nacio. Antaŭ la publika anonco pri aresto fare de la kuomintangaj reakciuloj, la observado de sekretaj policianoj, denunco de perfiduloj kaj ĉirkaŭatako de reakciaj literaturistoj, Lusin montris neniom da timo pro la persekuto kaj minaco de mortigo kaj ĉiam kredis ke nepre triumfos la popola revolucio sub la gvido de kamarado Maŭ Zedong.

Ignori la riproĉojn de milestro kun kolera brovo,

Volonte servi al infanoj kapokline kiel bovo.

Tiuj du versoj plej bone spegulas lian amon kaj malamon.


En oktobro de 1935, post la longa marŝo de 25,000 lioj, la Ĉina Laborista-Kampano Ruĝa Armeo venke atingis nordan Ŝenhi. Tio donis al Lusin grandan kuraĝigon kaj li sendis gratulan telegramon al la centro de la Partio kaj kamarado Maŭ Zedong pro tiu granda venko.

La 1-an de aŭgusto de 1935, dum la Longa Marŝo, la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio publikigis deklaron alvokante la tutan popolon kaj ĉiujn partiojn de la lando ĉesigi la enlandan

militon por kune rezisti kontraŭ la japana agreso. En decembro de la sama jaro, estis decidita la politiko de fondo de kontraŭjapana nacia unueca fronto. Sub la alvoko kaj gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, Lusin kaj ĉiuj literaturistoj, kiuj aprobis reziston kontraŭ Japanio, unuiĝis kaj formis vastan unuecan fronton.

Sed, ĝuste kiam Lusin intense laboris, lia ftizo fariĝis pli kaj pli serioza. En la fino de 1935 lia sano fariĝis ĉiam pli malbona. Multaj parencoj kaj amikoj admonis lin kuraciĝi en hospitalo aŭ iri eksterlanden

Lusin, lia edzino Hju Guangping kaj lia filo Hajjing en 1933



por resaniĝi. Sed por la revolucio, li ne volis forlasi sian laboron. Li diris: “Preferere rapide labori kaj mallongigi la vivon je kelkaj jaroj ol vivi kelkajn jarojn pli longe sed senfare; ĉar la rezulto estos sama...” Tial li persistis en sia laboro, se nur eblis al li eksidi post baraktado. Dum siaj lastaj jaroj li ankoraŭ skribis multajn verkojn kaj leterojn. La verkojn oni trovas en la *Lasta Kolekto de Eseoj el Kiegie Ting*.


En 19-a de oktobro de 1936, longtempa ftizo fine forrabis Lusin de ni.

Unu tagon post la forpaso de Lusin, la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio sendis kondolencan telegramon kaj en la nomo de la tuta popolo, postulis, ke la kuomintanga registaro faru por li ŝtatan enterigon, sed tion kuomintangaj reakciuloj impertinente rifuzis.

La batalon dum la tuta vivo de Lusin kamarado Maŭ Zedong tre alte taksas. En sia verko *Pri Nova Demokratio* kamarado Maŭ Zedong diris: “Kiel la ĉefgeneralo de la ĉina kultura revolucio, li estis ne nur granda literaturisto, sed ankaŭ granda pensulo kaj granda revoluciulo. Lusin estis homo kun plej malmolaj ostoj kaj sen ombreto da sklava mieno aŭ flatemo; kaj tio estas la plej valora kvalito por la koloniaj kaj duonkoloniaj popoloj. Sur la kultura fronto, Lusin estis la plej ĝusta, plej kuraĝa, plej fidela kaj plej arda nacia heroo senprecedenca en nia historio, kiu reprezentis la plejparton de la tuta nacio kaj brave sturmis kaj breĉis la malamikan batalvicaron. La direkto de Lusin estas tiu de la nova kulturo de la ĉina nacio.”

La revolucia spirito de Lusin por ĉiam vivos en la koro de la ĉina popolo.

1. La Opia Milito estis agresa milito provokita de la brita imperiismo kontraŭ Ĉinio. De la fino de la 18-a jarcento, Britio senĉese eksportis opion al Ĉinio en grandaj kvantoj por veneni la ĉinan popolon. Kaj renkontinte oponon de la ĉina popolo, ĝi sub la preteksto de protekto de negoco, ekspedis trupojn por agresi Ĉinion. La ĉina popolo kaj ĉinaj trupoj faris reziston kaj donis grandan baton al la britaj agresantoj.



Aŭtografo de Lusin

*La ĉambro, en kiu
Lusin lernis dum sia
infanaĝo*



2. Temas pri la moderniga movado de reformistoj, kiuj reprezentis la intereson de parto da liberalaj burĝoj kaj progresemaj bienuloj, sub la gvido de Kang Joŭvej, Liang Ĉiĉaŭ, Tan Sitong kaj aliaj. La movado ne havis bazon en la amasoj. Juan Ŝikaj kiu komandis la armeon, perfidis la sekreton de la reformistoj al la imperiestra patrino Cihi, la ĉefo de obstinaj konservativaj fortoj, tiel ke Cihi denove kaptis la regpotencon kaj mortigis Tan Sitong k.a.

sume 6 gvidantojn. Tragedie fiaskis tiu movado.

3. Jihetuan estis vasta spontanea movado de kamparanaj kaj metiistaj amasoj de norda Ĉinio en 1900, kiuj organiziĝis en okultismaj, sekretaj asocioj por armite kontraŭstari imperiismon. La aliancaj armitaj fortoj de 8 imperiismaj landoj okupis Pekinon kaj Tianginon kaj ekstreme kruele subpremis la movadon.

Lusin pri Esperanto

—Lia respondo al la demando de “La Mondo”

MI mem kredas ke mi subtenas Esperanton. Tion mi komencis sufiĉe frue, eble de ĉirkaŭ 20 jaroj. La kaŭzo estis tre simpla. Laŭ mia nuna rememoro: 1, ĉar per ĝi oni povas unuigi ĉiujn homojn de la mondo — precipe la subprematojn; 2, pro mia faka okupo, ĉar mi opinias ke ĝi povas servi en reciproka prezentado de literaturo inter diversaj popoloj; 3, ĉar mi vidas ke kelkaj esperantistoj mon-

tras sin superaj al egoistoj, kiuj havas koron malan al siaj paroloj.

Mi ne pli profunden pensis pri la afero poste, kaj tial nun mi ne povas pli multe diri ol kiel supre dirite. Mi ofte estas tia: mi jesas ion, sed mi ne povas motivigi ĝin per longa rezonado. Tamen, malgraŭ tio, fine pruvigos ke mia juĝo ne estis erara.

LUSIN

15 aŭgusto (1936)

Naskiĝloko

Spite la frostan vintron kaj vojaĝon de pli ol du mil loĝoj, mi revenas nun al mia naskiĝloko, forlasita antaŭ pli ol dudek jaroj.

Ĉar estas malfrua vintro, la vetero ŝajne des pli griziĝas, ju pli mi proksimiĝas al la celo. Malvarma vento sible blovas en la holdon. Tie kaj tie vidiĝas tra la fendo de la boattegmento sterilaspektaj vilaĝoj sub la plumba ĉielo kun nenia viveco. Iel mi sentas nereteneblan malĝojon.

Ho, ĉu tio estas la loko, kiu konstante karesas min en la memoro dum pli ol dudek jaroj?

Ĝi ne estis tia en la memoro, sed tute alia, multe pli bela. Tamen, se oni petus min rakonti pri ĝiaj belo kaj bono, mi ne havus klaran ideon kaj mankus al mi konvenaj vortoj. Mia naskiĝloko estis verŝajne ĝuste tia kiel nun. Tiam mi klarigas al mi mem: tia ja estis la naskiĝloko. Eĉ se ĝi ne evoluis, ĝi tamen ne povus ŝajni tiel malgaja kiel mi sentas ĝin nun. Efektive ĉio dependas de la persona kaprico, ĉar mi ne revenas kun bonhumoro.

Mi revenas nur por denove adiaŭi ĝin, ĉi-foje por ĉiam. La domo, en kiu nia tuta familio loĝis dum longaj jaroj, jam vendiĝis al alia familio kun komuna konsento. Ĉar la transdono de la domo nepre okazos en la kuranta jaro, mi devas forlasi antaŭ la novjaro la domon kiu estis tiel intima al mi. Malproksime de la hejma vilaĝo, mi translokiĝos en fremdan lokon, kie nun mi perlaboras la panon!

Matene de la sekvinta tago mi fine alvenis antaŭ mian domon. Sur la tegmento, inter la tegolsulkaj velkintaj herboj tremis en la vento. Tio klarigis, kial la domo devas ŝanĝi la mastron. La kune vivintaj parencoj verŝajne jam translokiĝis. Kvieto regis la tutan domon. Kiam mi atingis nian ĉambraron, mia patrino jam venis renkonte al mi; postkuris ŝin la okjara nevo Honĉjo.

Certe mia patrino ĝojegis, sed ne estis malkaŝita malĝojo en ŝia mieno! Ŝi petis min sidiĝi, ripozi kaj trinki teon, provizore ne menciante la translo-

kiĝon. Honĉjo rigardis min demalproksime, kva-zaŭ mi estus fremda homo; ĉar li neniam vidis min antaŭe.

Ni tuŝis fine la demandon pri la translokiĝo. Mi diris, ke mi jam luis domon kaj aĉetis ankaŭ kelkajn meblojn, kaj ke por kompletigi la ceterajn, ni devas forvendi la lignajn aĵojn. La patrino konsentis. Ŝi diris, ke la pakajoj estas jam preskaŭ pretigitaj, ke la neporteblajn objektojn ŝi jam vendis parte, kvankam la ricevita sumo estas tute bagatela.

“Ripozu kelkajn tagojn kaj vizitu la parencojn. Poste ni jam povas foriri,” diris mia patrino.

“Bone,” mi respondis.

“Ĵuntu ĉiam demandas pri vi, kiam ajn li venas ĉi tien. Li deziras vin revidi. Tial mi jam sciigis al li la proksimuman daton de via reveno. Eble li venos baldaŭ.”

En tiu momento mirinda bildo aperis en mia memoro. La orflava luno pendas sur la profunde blua firmamento. Sube sur la sableca marbordo, smeraldkoloraj akvomelonplantaĵoj etendiĝas senfine. En la kampo proksimume dekdujara knabo kun arĝenta ringo ĉirkaŭ la kolo kaj ŝtala forko en la mano celas kun tuta forto al ĉa-o*, kiu tamen ektorniĝinte forglitis inter liaj kruroj.

La knabo estas Ĵuntu. Mi konatiĝis kun li, kiam mi havis ĉirkaŭ dek jarojn. Jam pasis tridek jaroj! Tiam mia patro ankoraŭ vivis kaj nia stato estis sufiĉe bona. Mi mem estis sinjorido. En tiu jaro estis granda oferado en la hejmo. Nia vico por prizorgi ĝin venis nur post pli ol tridek jaroj. Tial ĝi estis grava kaj devis esti solena kaj tre pompa. Dum tuta monato de la novjaro oni oferis al la portretoj de l' praavoj diversajn aĵojn en luksaj ujoj, kiujn oni devis zorge gardi kontraŭ forŝtelo, ĉar multe da homoj venis fari riverencojn al la portretoj. Ĉe ni estis nur unu “okupata monato” (estas tri specoj de dungitoj: jara dungito estas nomata “longa jaro”; taga dungito estas “mallonga

* Ĉa-o — *besto parenca al melo.*

laboro"; kaj oni nomas "okupata monato" tiun, kiu mem estas farmisto kaj akceptas dunglaboron nur en specialaj okazoj, dum festoj, novjaro kaj rentumkolektado). La "okupata monato" estis tro okupita por ĉion prizorgi. Do, li petis permeson de mia patro, ke li venigu sian filon Ĵuntu por zorgi pri la ujoj.

Mia patro konsentis. Ankaŭ mi tre ĝojis, ĉar jam delonge mi aŭdis pri Ĵuntu, kies aĝo estis proksimuma al la mia. Li naskiĝis en supermonato kaj el la kvin elementoj mankas al li la tero, tial lia patro nomis lin Ĵuntu.* Oni diris, ke li kapablas aranĝi klapkaptilon por kapti birdojn!

Ĉiutage mi atendis la novjaron. Kiam ĝi alvenas, venos ankaŭ Ĵuntu. Finfine venis la jarfino. Iun tagon mia patrino diris al mi, ke li jam alvenis. Sagrapide mi kuris renkonte al li. Li estis tiam en la kuirejo. Ruĝe bruna ronda vizaĝo, malgranda felta ĉapo sur la kapo kaj brila arĝenta ringo sur la kolo pruvis, ke li estas eksterordinare amata de la patro. Por forpeli mortdanĝeron de li, la patro faris votpromeson al la Budho kaj metis arĝentan ringon ĉirkaŭ la kolon de Ĵuntu por lin reteni. Li estis tre sinĝena antaŭ nekonatoj, sed min li ne timis. Li komencis paroli kun mi post la foriro de la apudaj homoj. Post nelonga tempo ni fariĝis intimaj amikoj.

Mi ne memoras klare, pri kio ni babiladis, escepte ke li diris tre ĝoje, ke li vidis multon en la urbo, kion li ne vidis antaŭe.

Dum la sekvinta tago mi jam petis lin kapti birdojn.

"Nun ne eblas. Ĉe ni post forta neĝado oni forbalaas la neĝon de eta tereno sur sableca grundo. Sur ĝi oni starigas tre grandan kaj malprofundan bambukorbon, apogitan sur stangeto. Sube greno estas disĵetita por allogi la birdojn. Kiam ili alvenas, oni ektiras de malproksimo la ŝnuron, ligitan



Lusin kaj Ĵuntu

al la stango, kaj ili estas kaptitaj sub la korbo. Tiel oni povas kapti diversajn birdojn: fazanojn, perdrikojn, kukolojn, bludorsulojn..."

Mi sopiregis do al la neĝado, sed Ĵuntu ŝanĝis la temon:

* "Ĵun" signifas supermonaton kaj "tu" teron. La ĉina lunkalendara jaro havas nur 354—355 tagojn kaj oni aldonas supermonaton al ĉiu tria jaro. — Ĉinaj astrologoj kredas, ke la fizika mondo konsistas el kvin elementoj, nome: metalo, ligno, akvo, fajro kaj tero. Ĉiu homo naskiĝas sub ilia influo. La kvin elementojn, kiujn ĉiu aparta homo posedas, difinas la jaro, monato, tago kaj horo de lia naskiĝo. La interrilatoj de tiuj posedataj elementoj antaŭfiksas la sorton de la homo.

“Nun estas tro malvarme. Venu somere al mia hejmo. Ni iros kune kolekti konkojn ĉe la marbordo. Estas tie ruĝaj, verdaj, ankaŭ ‘timindaĵo por la diablo’ kaj ‘mano de Avalokiteŝvaro*’ kaj aliaj. Mi iras ĉiuvespere kun mia patro por gardi la akvomelonojn. Nu ankaŭ vi venu kun ni.”

“Ĉu vi gardas ilin kontraŭ ŝtelistoj?”

“Ne, ĉe ni tio ne estas ŝtelo, se vojirantoj prenas melonon por ĉesigi la soifon. Ni gardas ĝin kontraŭ meloj, erinacoj kaj ĉa-oj.”

“Dum luna nokto ofte oni aŭdas la maĉadon de ĉa-o, kiu mordetas la melonon. Tiam ni aliras ŝtele kun forko...”

Kiel nuntempe, ankaŭ tiam mi ne havis eĉ etan ideon pri ĉa-o. Mi imagis senkaŭze, ke ĝi aspektas kiel tre sovaĝa hundeto.

“Ĉu ĝi ne mordas homon?”

“Oni iras kun forko! Kaj oni pikas kiam ajn ĝi aperas. Ĝi estas tre lerta: ĝi venas vidalvide al vi kaj fuĝas inter viaj kruroj. Ĝia haŭto glite brilas, kvazaŭ ĝi estus oleumita...”

En tiu tempo mi estis surprizita pri la ekzisto de tiom multe da kuriozaj aferoj en la mondo: tiom da koloraj konkoj ĉe la marbordo, tiom da aventuroj pro la akvomelono-kulturado. Mia scio limiĝis simple al tiu fakto, ke ĝi estas vendata en fruktobutikoj.

“Kiam venas la tajdo, multaj fiŝoj restas kaj saltadas sur la sabla tero. Tiuj ‘saltantaj fiŝoj’ havas du piedojn kiel la ranoj...”

Ho, kiom da senfine interesaj aferoj konas Ĵuntu, pri kiuj miaj aliaj kamaradoj ne scias. Ili, same kiel mi, vere nenion vidas krom la kvadrat-forma ĉielo super la korto, ĉirkaŭata de altaj muroj, kiam Ĵuntu vagas ĉe la marbordo.

Bedaŭrinde jam pasis la unua monato de l’ nova jaro. Ĵuntu devis hejmeniri. Mi ploregis. Li ankaŭ ne volis foriri; li eĉ rifuzis forlasi la kuirejon kaj ploregis. Sed kion fari? Finfine li foriris, preskaŭ trenate de la patro. Poste li sendis al mi pakajon da konkoj kaj kelkajn belegajn birdplumojn pere de sia patro. Miaflanke ankaŭ mi sendis al li kelkfoje iom da objektoj. Sed poste ni ne plu vidis unu la alian

En tiu ĉi momento, kiam la patrino menciis lian nomon, la knabaĝa memoro reviviĝis fulme antaŭ miaj okuloj. Ŝajnis, ke mi revidas la belan pejzaĝon de la naskiĝloko.

“Tre bone! Do, kiel li fartas?...”

“Li? Ĉio turniĝis kontraŭ li...” Intertempe la patrino ĵetas rigardon eksteren. “Tiuj homoj venas denove. Ili forprenas laŭvole meblojn sub preteksto de aĉeto. Mi devas iri por atenti ilin.” La patrino stariĝas kaj foriras.

Virinaj voĉoj aŭdiĝis ekster la pordo. Mi venigis Honĉjon al mi. Mi babilis kun li kaj demandis, ĉu li kapablas skribi, deziras vojaĝi aŭ ne.

“Ĉu ni veturos per trajno?”

“Jes, per trajno.”

“Kial ne per ŝipo?”

“Unue per ŝipo, ...”

“Ho, kia li aspektas! Jam tiom kreskis lia barbo!” laŭte sonis strange akra voĉo.

Surprizite mi levis la kapon. Antaŭ mi staris ĉirkaŭ kvindekjara virino kun elstaraj vangostoj kaj maldikaj lipoj. Ŝi apogis ambaŭ manojn sur la femuroj. La du senjupaj kruroj staris aparte kiel cirkelo kun maldikaj brakoj, uzata por desegnado.

Mi nenion komprenis.

“Ĉu vi ne rekonas min? Iam mi portis vin sur la brakoj!”

Sed mi nur des pli embarasiĝis. Feliĉe el la situacio savis min mia patrino, kiu intertempe revenis.

“Tiel longe li forestis, ke li forgesis ĉion.” Ŝi turnis sin al mi. “Ŝi estas Dua Bofratino Jang, kiu havas *toŭfu*-butikon** oblikve kontraŭ nia domo.”

Ho, tiam mi ekmemoris. Vere, la tiel nomata Dua Bofratino Jang sidadis ĉiam en sia *toŭfu*-butiko. Oni nomis ŝin “*Toŭfu*-Hiŝi+”. Sed tiam ŝi estis pudrita kaj la vangostoj ne tiom elstaris; ankaŭ la lipoj ne estis tiel maldikaj kiel nun. Ŝi sidadis tutan tagon, kaj ĝuste tial mi neniam vidis ŝin staranta kiel cirkelo. Tiutempe oni klaĉadis, ke la butiko tre prosperas pro ŝia beleco, kio—versajne pro mia infaneco—tamen ne impresis min. Tial mi entute forgesis ŝin. Ŝia buŝo tordiĝis ironie pro malkontenteco, kvazaŭ priridante, ke francoj ne konas sian Napoleon kaj usonanoj Washington.

* *Avalokiteŝvaro*: nomo de budho.

** *Toŭfu*o — populara manĝaĵo farita el fabo en formo pli malpli simila al kazeo.

+ *Hiŝi* estis fama belulino en la antikva tempo.

“Forgesis? Povas esti, ĉar la okuloj de via moŝto rigardas tro alten!...”

“Ne tial! Mi...nur...,” mi ekstaris kaj balbutis ĝenate.

“Nu bone, aŭskultu min, Sinĉjo. Via prospero ne bezonas ĉi tiujn pezajn, eluzitajn meblojn, kiuj estas tro pezaj por transporto. Lasu al mi ilin forporti; ili tamen estas utilaj al ni malriĉuloj.”

“Mi ne estas riĉa, tial mi devus ilin vendi, por...”

“Ho, vi jam fariĝis prefekto kaj tamen ne riĉa? Vi ja havas tri kromedzinojn kaj sidas nur en luksa seĝo portata de ok servantoj kaj tamen ne riĉa? Nenion vi povas kaŝi de mi!”

Mi komprenis, ke estas senutile disputi kun ŝi, do mi fermis mian buŝon kaj staris silente.

“Ho ve! ju pli oni fariĝas riĉa, des pli oni estas avara, kaj ju pli avara, des pli riĉa...” La cirkelo grumblante kaj kolere turnis sin. Fine, malrapide elirante, ŝi ŝovis sub la veston paron da gantoj de mia patrino.

Poste ankoraŭ venadis proksime loĝantaj parencoj unu post la alia. Pasis tiel tri-kvar tagoj. Dume mi ordigis la pakaĵojn, profitante la liberajn horojn.

Estis frosta posttagmezo. Post la tagmanĝo mi sidis trinkante teon kaj sentis, ke iu envenas de ekstere. Mi turnis min kaj ege surpriziĝis. Mi ekstaris kaj iris renkonte al la veninto.

Li estis Ĵuntu. Kvankam mi rekonis lin ĉe la unua rigardo, tamen li ne estis tia, kia mi memoris lin. La staturo kreskis al duoblo. La antaŭe ruĝbruna, ronda vizaĝo fariĝis flave griza kaj plena de faltoj. La orbitoj ŝveligis kaj ruĝigis kiel tiuj de lia patro. Sed tio ja estis komprenebla, se oni laboris ĉe la marbordo kaj tuttage estis en la mara vento. Sur la kapo sidis ĉifona felta ĉapo. Maldika vatvesto kovris la kuntiritan korpon. Li portis paperpakaĵon kaj longan pipon en la manoj palaj, mallertaj, kun disfendiĝinta haŭto, simila al pinŝelo. Ili ne plu estis la iamaj, kiel mi memoras, ruĝaj, grasetaĵaj kaj lertaj manoj. Mi ekscitiĝis, ne sciante kiel komenci la parolon.

“Ho, frato Ĵuntu. Finfine vi venas...”

Ĉeno de vortoj emis ŝpruci el mia buŝo: perdriko, saltanta fiŝo, konko, ĉa-o; sed mi ne povis ilin eldiri. La vortoj nur kirliĝis en la cerbo, kvazaŭ io barus al ili la elbuŝigon.

Ĝojo kaj malĝojo miksite radiis el lia vizaĝo. Li ekmovis la lipojn, sed la vortoj apenaŭ estis

aŭdeblaj. Post momenta barakto humiliĝis lia konduto kaj li diris klaravoĉe:

“Via sinjora moŝto!...”

Mi sentis frostotremon. Ho, tragika dika muro staras jam inter ni. Mi ne povis paroli, sed li diris, sin turnante:

“Ŝujŝeng, riverencu antaŭ lia sinjora moŝto!”

Li antaŭentiris la infanon, kiu ĝis nun sin kaŝis malantaŭ lia dorso. Jen la portreto de Ĵuntu antaŭ dudek jaroj, nur iom pli pala kaj malgrasa kaj la arĝenta ringo mankis ĉirkaŭ la kolo.

“Tio estas mia kvina filo. Li estas timema, ĉar li neniam havis kontakton kun fremduloj.”

Malsuprenvenis mia patrino kun Honĉjo. Verŝajne ili ambaŭ aŭdis la voĉojn.

“Sinjorino, mi ricevis vian leteron kaj tre ĝojis, eksciinte la revenon de lia sinjora moŝto,” salutis ŝin humile Ĵuntu.

“Ho, kial vi tiel ceremonias? Ĉu vi ne nomis vin frato unu la alian? Ankaŭ nun faru same,” diris mia patrino bonhumore.

“Oj, ne, ne, sinjorino! Kia absurdaĵo! Tiam mi estis simpla infano, kiu nenion sciis,” kaj li denove ordonis al la filo riverenci. Sed la knabo tamen hontis kaj nur kroĉiĝis al la patra dorso.

“Ĉu li estas via kvina infano Ŝujŝeng? Ne estas mirinde, ke li timas. Efektive ni ĉiuj estas fremduloj al li. Nu iru vin amuzi kun Honĉjo,” diris mia patrino.

Tion aŭdinte, Honĉjo alpaŝis al Ŝujŝeng, kiu eliris kun li senĝene. Poste la patrino petis Ĵuntu sidiĝi. Li sidiĝis post momenta hezito kaj apudmetinte la pipon, proponis la paperpakaĵon.

“Estas nenio havebla dum la vintro. Tio estas sekigitaj faboj, kiujn ni sunbakis hejme. Bonvolu via sinjora moŝto...”

Sekvis mia demando pri lia vivstato. Li nur skuis la kapon.

“Estas tre malfacile! Kvankam la sesa infano jam helpas ĉe laboro, tamen ĉiam ne sufiĉas la manĝaĵo: la tempoj estas tiel maltrankvilaj! ... Oni ĉie kaj ĉiam premas monon el ni. Fiksita regulo ne ekzistas. Cetere la rikolto estas malbona. Por porti la produktaĵojn al la foiro, oni devas pagi impostojn plurfoje kaj fine forvendas deficite; alie ili putriĝus hejme...”

Li denove kapskuis. Oni tamen ne povis ellegi ian ajn emociion de lia faltoplana vizaĝo: kvazaŭ ĝi estus ŝtonskulptaĵo. Probable li sentis nur doloron, kiun li ne kapablis priskribi. Post momenta silento li prenis la pipon kaj ekfumis.

Informigante, mia patrino eksciis, ke pro hejmaj zorgoj li devas reiri la sekvantan tagon. Ŝi konsilis ke li en la kuirejo revarmigu por si *fan-on**, ĉar li ankoraŭ ne tagmanĝis.

Ĵuntu eliris. La patrino kaj mi bedaŭris lin pro lia malbona vivstato: aro da infanoj, malsato, altaj impostoj, soldatoj, banditoj, burokratoj, bienuloj, ĉiuj tiel turmentas lin, ke li fariĝis sensenta, ligna marioneto! Patrino proponis: “Ni lasu lin elekti ion ajn el la objektoj, kiujn ni ne povas transporti.”

Posttagmeze, li elektis du longajn tablojn, kvar seĝojn, kompletan da incensujo kaj kandelportilojn kaj grandan pesilon. Li petis ankaŭ pajlocindron, —ĉe ni oni hejtas per rizpajlo, kies cindron oni utiligas por sterki la sablecan teron. Li forportos ĉion en la tago de nia foriro.

Dum vespero ni babilis pri bagateloj; la sekvintan tagon li foriris frumatene kune kun Ŝujŝeng.

Post naŭ tagoj alvenis la tempo de nia forveturo. Ĵuntu aperis frumatene, ĉi-foje ne kun Ŝujŝeng, sed kun kvinjara knabino, kiu gardis la boaton. Tutan tagon ni estis okupitaj kaj ne havis eĉ momenton por babili. Venis ankaŭ sufiĉe multaj gastoj; kelkaj simple nur por adiaŭi, aliaj por forporti objektojn aŭ por ambaŭ celoj. Vespere, ĉe nia enŝipiĝo, malaperis jam ĉiuj malnovaj objektoj, grandaj kaj malgrandaj, krudaj kaj fajnaj, kvazaŭ balaitaj el la tuta domo.

Kiam la ŝipo veturis antaŭen, en la krepusko fariĝis malhelaj la verdaj montoj ĉe ambaŭ flankoj kaj forglitis ĉiam malantaŭen.

Apogante sur la fenestro, mi kaj Honĉjo rigardis la pejzaĝon nebulecan.

“Oĉjo, kiam ni revenos?” demandis subite Honĉjo.

“Reveni? Kial vi pensas jam pri reveno, kiam ni eĉ ne foriris ankoraŭ?”

“Ĉar mi promesis al Ŝujŝeng ke mi iros ludi kun li en lia hejmo...” Li enpensiĝis stulte, kun gapantaj okuloj.

Mi kaj la patrino sentis la saman malĝojon, kaj ni denove parolis pri Ĵuntu. Ŝi diris interalie, ke

Toŭfu-Hiŝi venadis ĉiutage al nia domo, de kiam la pakajoj komencis esti pretigataj. Antaŭhieraŭ ŝi malkovris dekelkajn bovojn kaj telerojn en la cindroamaso. Post ioma diskutado ŝi konkludis, ke Ĵuntu kaŝis la objektojn por forporti kune kun la cindro. Kiel rekompenco de sia merito, Dua Bofratino Jang prenis “hundĉagrenilon” (Tio estas instrumento por koknutrado — ligna plado kun krado ĉirkaŭe. La kokoj povas enŝovi sian kapon tra la krado por preni la nutraĵon, sed hundo ne povas kaj nur ĉagreniĝas rigardante apude.) kaj —malgraŭ la bandaĝitaj pintaj piedoj kun tre altaj kalkanumoj — forkuris kun ĝi sagrapide.

Nia malnova domo jam foriĝas el la vido. Ankaŭ la tuta pejzaĝo de mia naskiĝloko iom post iom malproksimiĝas. Mi tamen sentas nenian bedaŭron nek sopiron. Mi nur sentas, ke nevideblaj altaj muroj izolis kaj enkarcerigis min. Tio forte sufokas kaj turmentas min. Antaŭe al mi estis klara la vizio pri la heroeto kun argenta ringo sur la kolo en la melonkampoj, sed nun subite nebuliĝas. Mi sentas teruran malĝojon!

La patrino kaj Honĉjo jam endormiĝis.

Ankaŭ mi kuŝiĝas. Nur la akvoplaŭdoj sub la ŝipo konsciigas min, ke mi estas vojaĝanta. Mi kaj Ĵuntu jam tiel disiĝis unu de la alia, sed niaj posteuloj restas nun kune! Ĉu Honĉjo ne pensas pri Ŝujŝeng? Mi esperas, ke ili ne sekvos mian ekzemplon kaj neniam fremdiĝos. Tamen mi ne deziras, ke por resti ĉiam kune, ili havu suferplenan kaj vagan vivon kiel mi, nek vivu tiel inerte kaj afliktite kiel Ĵuntu, aŭ diboĉe kaj ĉiam okupite kiel aliaj homoj. Ili devas havi novan vivon, de mi neniam spertitan.

La ideo pri tia espero subite timigas min. Mi priridis kaŝe la idoladoremon de Ĵuntu, kiam li petis de ni la incensujon kaj kandelportilojn. Ĉu mia nuna espero ne estas idolo fabrikita de mi mem? Se ekzistus ia diferenco inter ili, do nur tio, ke la lia estas pli aktuala, la mia pli malcerta.

Antaŭ miaj okuloj, eketendiĝas smeralda sablejo ĉe la marbordo. Supre, sur la profunde blua firmamento pendas orflava disko de plenluno. Mi kredas, ke la espero estas nek efektiva, nek iluzia, same kiel surtera vojo, kiu komence ne ekzistis, sed estiĝis post multeripeta paŝado de homaj piedoj.

Januaro 1921.


* *Fano* — la plej kutima manĝaĵo en Ĉinio el kuiritaj senŝeligitaj grajnoj de greno, *preĉpe de rizo*.

La Nova Fizionomio de la Naskiĝloko de Lusín



Traktoretoj produktitaj de Ŝaŭhing

*Sterko produktita de la
Ŝaŭhing-a Kemisterka Fabriko*



*Komunumanoj de Sangvang-brigado de
Ŝaŭhing konstruas ŝtuparajn kampojn.*





Fuŝeng-komunumo de Ŝaŭhing hodiaŭ jam uzas plugilon funkciigatan per elektro.

La malgranda fera kaj ŝtala fabriko de Ŝaŭhing-gubernio preparas norman koakson.



Havena Urbo ĉe Suda Maro

Kemia fabriko de Ĝangiang

KIAM oni rigardas malsupren de sur domego de la Ĝangiang-a Havena Administracio, antaŭ la okuloj aperas nova industria urbo anstataŭ malnova Ĝangiang antaŭ pli ol 20 jaroj. Belaj magnolioj kaj kokosarboj pompe kreskas ĉirkaŭ domegoj en la urbo; larĝaj kaj ebenaj asfaltaj stratoj interkruĉiĝas; la vasta tero ĉiam verda ĉirkaŭ la urbo estas kvazaŭ bela brodaĵo. Pli malproksime, blankaj veloj punktas la maron, la veturantaj ŝipoj levas arĝentajn ondojn...

Ĝangiang pasinte estis nomata Guangĝouŭan (Guangĝou-golfo). Situate en nordoriento de Lejĝou-duoninsulo de Guangdong-provinco, ĝi frontas al la vasta Suda Maro kaj ligiĝas dorse kun sudokcidenta regiono de nia lando, kiu havas grandan areon kaj riĉajn produktaĵojn.

Antaŭ la Liberiĝo, Guangĝouŭan estis nomata de laborantaj popolanoj golfo de sango kaj larmoj. Fruo en 1898, pro putriĝo kaj malfortiĝo de la registaro de King-dinastio la imperiismo okupis ĝin per armeo kaj ekde tiam ĝi fariĝis kolonio de imperiismo. De 1943 Guangĝouŭan estis sub la sanga regado de la japanaj faŝistoj kaj kuomintangaj reakciuloj dum longa tempo. Tiam blanka teroro vualis grandajn aŭ malgrandajn stratojn. Ĉie vidiĝis rabado, ĉantaĝo, hazardludejoj kaj prostitejoj. Tamen tie troviĝis preskaŭ nenia industrio. Por prirabi Ĉinion, imperiistoj konstruis en 26 jaroj varfon longan je 327 metroj per riĉaĵo akirita en sia ekspluatado al la ĉina popolo. Al tiu varfo vaporŝipo ne povis proksimiĝi, ĝi nur taŭgis por

ankro de vela ŝipo de malpli ol 30 tunoj. Uzante ĝin, imperiismo elŝipigis opion keston post kesto kaj armilojn por veneni kaj murdi la ĉinan popolon kaj forrabis grandan kvanton da materialoj, oro kaj arĝento de Ĉinio. Antaŭ la Liberiĝo, kun preteksto de konstruo de la haveno kaj fervojo, la kuomintangaj reakciuloj impostis monon kaj grenon kaj avare elpremis grandan kvanton da sango kaj ŝvito de la laboranta popolo. Tamen, kun poŝo plena per rabita mono, ili forkuris sen ia faro. Antaŭ 22 jaroj, Guangĝouŭan ĝuste estis tia suferplena haveno.

La hodiaŭa Ĝangiang fariĝis fame konata haveno de la suda Ĉinio. La konstruado de pli ol 20 jaroj donis al ĝi tute novan fizionomion. Kiel mastroj de la ŝtato, la laboristoj de Ĝangiang forigis malpuraĵon de la malnova socio kaj konstruis novan socialisman havenon per sia diligenta laboro. Nun la haveno havas tri kajojn, kun mekanikigitaj ekipaĵoj de transportado, ŝargado kaj malŝargado. Per pli ol unu jaro, la ĉinaj laboristoj sukcesis mem projekti kaj konstrui tiun novan havenon. Nelonge antaŭ ekkonstruo de la haveno ili ankoraŭ konstruis la fervojon de Litang ĝis Ĝangiang longan je 300 kilometroj, kiu ebligis al vagonaro veturi ĝis la bordo de Suda Maro, interligis la havenon kun la sudokcidenta regiono de nia lando kaj pli efike subtenis socialisman konstruadon de la patrolando kaj mondan revolucion. Nun la jarkvanto de ŝargado kaj malŝargado de varoj estas pli ol 30 obloj de tiu de la rekorda jaro antaŭ la Liberiĝo.

La antaŭa Ĝangiang estis konsumata urbo kiu importis eĉ ŝraŭbon, nun disvolviĝis en unuapase prosperan industrian urbon post konstruado de 22 jaroj. Ĝi havas industriojn de ferŝtalo, kemio, elektro, ŝipkonstruado, maŝinfabrikado, elektrono, ŝpinteksado, paperfarado, elektra motoro, traktoro, aŭto, insekticido, kemia sterko, sukerfarado, salfarado, konstruaj materialoj kaj aliaj gravaj branĉoj. Ankaŭ kvartala industrio havas rapidan disvolviĝon. La antaŭa dezerta bordo de Guangĝouvan nun turniĝis en industrian kvartalon, kie alte interkruciĝas alttensiaj dratoj, dense staras fabrikoj.

En la centro de tiu kvartalo, sin trovas Ĝangiang-a Fabriko de Maŝinoj, kiu havas preskaŭ 500 laboristojn kaj oficistojn, 80,000 kvadratajn metrojn da plankoj de fabrikdomoj kaj aŭtomatajn ekipaĵojn. Antaŭ la Liberiĝo ĝi konsistis el tri malgrandaj mezurilaj metiejoj. Komence de la Liberiĝo ĝi havis sume 17 laboristojn, unu feran martelon kaj du forlasitajn rimenajn tornilojn. Post kelkaj jaroj, la fabriko jam ŝanĝis sian fizionomion. Nun


ĝi povas produkti ne nur diversajn agrikulturajn instrumentojn kaj ilmaŝinojn por subteni agrikulturon kaj sin armi, sed ankaŭ produktas kompletojn da ekipaĵoj por metalurgio, olerafinado kaj minekspluatado, per kiuj ĝi subtenis la socialisman konstruadon de la regiono Ĝangiang kaj aliaj provincoj.

De la Naŭa Kongreso de la Partio okazigita en aprilo 1969, laboristoj de Ĝangiang kreis elstaran atingon en teno de revolucio kaj stimulo de produkto. En tre mallonga tempo ili konstruis laborejon de LD-procedo kaj produktis bonkvalitan ŝtalon unufoje en Ĝangiang. En 1970 la Ĝangiang-a Fabriko de Elektraj Motoroj kaj aliaj pli ol dek unuoj en kunlaboro fabrikis solkristalan fornon. Nun la urbo jam povas produkti solkristalan kaj polikristalan siliciojn, metalajn magnezion kaj titanon kaj pli ol 20 specojn de elektrona elemento. Aŭtoriparistoj de la Transporta Kompanio produktis nombron da malpezaj kamionoj "Zili", malferminte aŭtofabrikan historion de Ĝangiang. La Unua Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj de Ĝangiang produktis grandajn pumpilojn de la tipoj 8016 kaj 80125. Ĝangiang-a Fabriko de Maŝinoj produktis altrapidan rotacipresilon kaj aliajn novajn produktaĵojn.

Dum 22 jaroj post la Liberiĝo Ĝangiang havas rapidan disvolviĝon ankaŭ en urba konstruado.

La totala areo de urbo plivas-tiĝis je pli ol 7 obloj kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo. La plankareo de novaj domoj atingis 1,235,000 kvadratajn metrojn. Jam en la komenco post la Liberiĝo multaj transportaj laboristoj, kiuj noktis ĉe la pordoj antaŭ la Liberiĝo, unuj post aliaj enloĝiĝis en novajn domojn. La Partio kaj popola registaro konstruis placojn kaj parkojn por la laboranta popolo. Ambaŭflanke de stratoj, en kortoj, en liberaj spacoj kaj en parkoj estis plantitaj floroj kaj pli ol 6,000,000 arboj. Tre bela estas la Apudmara Parko, kies densa kokosarbaro prezentas tropikan pejzaĝon. Sur

Ĝangiang-haveno



ĝiaj kvietaj avenuoj ĉiutage promenas laborantaj popolanoj. Antaŭ la densa arbaro etendiĝas blua Suda Maro. La arĝentaj ondoj frapas rokojn apud arbaro kaj formas blankajn flo-rojn, kiuj ĉarmas homojn. La marbordaj domoj, ĝardenoj kaj vilaoj posedataj de koloniistoj, burokratoj kaj kapitalistoj antaŭ la Liberiĝo nun fariĝis ripozejoj kaj vidindejoj de la laboranta popolo.

Hodiaŭ, Ĝangiang jam ŝanĝis sian malnovan fizionomion en diversaj flankoj. Kun amikeco inter la ĉina popolo kaj diverslandaj popoloj, oceanaj ŝipoj navigadas inter kvin kontinentoj. Trajno, aŭtoj kaj aviadiloj transportas pasaĝerojn kaj varojn al urboj kaj kamparo de la lando. La merkato estas prospera, varprezoj stabilaj, komercaĵoj sufiĉaj, iliaj rezervoj abundaj kaj aĉetpovo de la popolo senĉese altiĝas. En ordinaraj familioj estas biciklo, kudromaŝino kaj radioricevilo. Tute noviĝis la fizionomio de la urbo en higieno. Nun en la tuta urbo estas pli ol 100 higienaj unuoj. De urbaj kvartaloj ĝis vasta kamparo en antaŭurbo, kaj de hospitaloj ĝis fabrikoj kaj lernejoj formiĝis kompleta sistemo de kuracado kaj sanprotektado, kiu efike garantias la sanon de la laboranta popolo. Ankaŭ la kultura kaj eduka afero prosperiĝas tagon post tago. Nun la nombro de lernejoj pliiĝis je pli ol 15 obloj kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo kaj tiu de lernantoj je 21 obloj. Ĉiuj geknaboj en lerna aĝo vizitas lernejojn kaj jam delonge efektiviĝis ĝenerala eduko de elementa kaj meza lernejo.




*Loĝejo de laboristoj kaj oficistoj
de la Fiŝa Kompanio de Ĝangiang*

Retrorigardante la batalan historion kaj ĝoje vidante la novan ŝanĝiĝon de la haveno, la Ĝangiang-a popolo kun entuziasmo laboras sur diversaj postenoj por konstrui la socialisman patrolandon ankoraŭ pli prospera kaj potenca.

GIANG HONG

Ŝtalfandado per LD-procedo





Prto de la Dependado Hospitalo de la Medicina Kolegio de Gangiang

En la Apudmara Parko





Pendoponto super la Flava Rivero

HUANG HONG

ĈE la pramejo de la Flava Rivero en Ŝiĉuan komunumo de Gaŭlan-gubernio, Gansu-provinco, nova pendoponto simila al fluganta drako pendas super la Flava Rivero.

Tiu ĉi ponto longas 435 metrojn kaj larĝas 7 metrojn, kun ĉefa parto 165-metra. Ĝi estis konstruita de la komunumanoj de la brigadoj Ŝangĉe, Nanĝuang kaj Ĉangpo, sub helpo de la superaj instancoj kaj pli ol 20 industriaj unuoj.

I

Tiuj tri produktaj brigadoj estas ĉirkaŭataj de la Flava Rivero en tri flankoj, kaj en la kvara flanko staras monto. Estas malfacile transpasi la torentan riveregon kun furiozaj ondoj kaj la monton kun kruta zigzaga vojeto.

De multaj generacioj, transpaso de la rivero estis unu el la grandaj malfaciloj en la vivo de la laborantaj popoloj sur tiu loko.

Eĉ hodiaŭ multaj el la tieaj loĝantoj ankoraŭ akuzis la malnovan socion pri malfeliĉaj okazaĵoj en pramado.

En tiuj suferoplenaj jaroj, oni transpasis la riveron ĉefe per ŝafledaj flosoj. En somero, la Flava Rivero subite ŝveligis kaj la kota fluo ruliĝis kun ondegoj. Kiom da flosoj estis glutitaj de la malica torento! Kiom da homoj fariĝis nutraĵo de fiŝoj! Kiu povus nombri kaj memori la akcidentojn okazintajn en la pasinteco! Kiel forte la laboranta popolo de tiu loko sentis bezonon de ponto super la Flava Rivero!

Post la Liberigo, sub zorgo de la Partio, instaligis sur la rivero pramo tirata per ŝtala kablo. Multe pli faciligis kaj sekurigis transpaso de la rivero.

Tamen sekve de la disvolviĝo de la produkto, la tri brigadoj ĉiujare devas elporti trans la riveron preskaŭ 5 milionojn da kg. da fruktoj kaj enporti grandan kvanton da sterko kaj agrikulturaj instrumentoj de trans la rivero. Kaj krome, komunumanoj devas transpasi la riveron por produkta laboro kaj pli kaj pli grandigas la nombro de homoj, kiuj bezonas servon de pramo, tiel ke la boatoj pli kaj pli ne povas kontentigi la bezonon. Sekve, la komunumanoj decidis konstrui pendoponton super la Flava Rivero.

II

La 13-an de novembro, 1969, stimulate de la amasa movado **“lerni de Daĝaj en agrikulturo”** komenciĝis la konstruado de la ponto. Kun granda entuziasmo kaj alta batalvolo, konstrua trupo kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kiel la spino marŝis al la konstruejo.

La unua batalo por la konstruado estis starigi du pilierojn 15 metrojn altajn sur la riverlito. Tiam estis vintro kaj tranĉe malvarmega estis la rivero akvo, sed la konstruantoj konkure saltis en la fluon profundan ĝis la genuo kaj komencis pretigi bazajn fosadojn. Ili konstruis ĉirkaŭbarojn el tritika pajlo, sablo kaj ŝtonoj kun alteco de kelkaj metroj, efike baris la akvon, kaj poste formovis ŝlimon kaj sablon de la riverlito kaj pretigis la

fosaĵojn ĝis roka fundo profundan je kelkaj metroj.

Kiam la bazaj fosaĵoj pretiĝis, oni ankaŭ elfaris ferajn skeletojn sur la bordo. Sed kiel oni movu gigantan skeleton kun pezo de kelkaj tunoj en la fosaĵojn ne havante arganon? Tiam sin anoncis dekoj da homoj samtempe por plenumi la taskon. Iuj el ili ĉirkaŭis ĝin, aliaj penetris en la liberajn spacojn en la skeleto kaj transmovis ĝin colon post colo en la fosaĵojn, per la kolektiva forto.

La du pilieroj pli kaj pli altiĝis kaj fine atingis la difinitan altecon de 15 metroj antaŭ la fiksita dato.

I-ŝtalaj pecoj por fari trabojn estis alportitaj al la konstruejo, kaj por fari el ili ŝtalajn trabojn oni devis ilin kunfiksi per boltoj. En la komenco, estro de la laborgrupo de feraĵoj Vang Lihua kaj kelkaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kiuj neniam tuŝis maŝinon antaŭe, boris truojn per prunteprenita malnova drilmaŝino. Sed la laborefiko estis tre malalta kaj ofte difektiĝis la borilo. Por ripari difektitajn borilojn, oni devis ilin sendi al Langou. Ĉu estas neeble por ili ripari kaj akriĝi borilojn per simpla metodo? Kiam ili pensis pri tio, oni diris al ili, ke akriĝo de borilo estas malfacila afero, se oni ne bone scias la teknikon, varmego produktita dum frotumado povas moligi la borilon kaj ĝin detrui, kaj se oni ne povas doni ĝustajn angulojn al la klingoj de la borilo, tiam ĝi aŭ ne povas detranĉi feron aŭ facile difektiĝas en laboro. Vere tio estas objektiva leĝo. Sed ĉu oni ne povas frotumi borilon per simpla metodo? La instruo de Prezidanto Maŭ en la verko *Pri Praktiko* “**Eltrovi veron tra praktiko, kaj denove tra praktiko pruvi kaj disvolvi veron**” lumigis ilian penson. Ili ekkonis, ke oni povas ripari kaj akriĝi borilon per simpla metodo, se nur oni agas konforme al la objektivaj leĝoj. Kaj por trovi la objektivajn leĝojn, la sola vojo estas praktiko.

Prenante akvon kiel malvarmigilon, ili venkis la malfacilon en varmigo dum frotumado per smirgarado. Ili frotume formis diversajn angulojn al la klingoj de boriloj, prove boris kaj trovis en praktikado la taŭgajn klingo-angulojn. Ili sukcesis fine en frotumado de boriloj per simpla metodo, kaj tiel altiĝis la laborefikon.

Post borado de la truoj en la ŝtalpecoj, oni devis ilin bolti. Iu diris, ke oni devas uzi pneŭmatikan boltilon por fiksi bolton kun granda diametro,

alie oni ne povas plenumi la laboron bonkvalite. Sed ili ne havis tian aparaton, do ili uzis martelon anstataŭe. Ili boltis dekelkajn boltojn, sed neniuj boltoj atingis la postulatan kvaliton. En kio kuŝis la kaŭzo? Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, ke “**sen konkreta analizo ne eblas koni la karakteron de ia ajn kontraŭdiro**”, Vang Lihua faris konkretan analizon pri la funkcio de pneŭmatika boltilo kaj martelo kaj trovis, ke la unua frapas pli rapide kaj sekve povas strikte fiksi la bolton antaŭ ol ĝi malvarmiĝas; dum martelo moviĝas malrapide kaj sekve la bolto malvarmiĝas jam antaŭ ol ĝi estas strikte fiksita. Post eltrovo de la propra karaktero de la kontraŭdiro, oni ankaŭ trovis solvon de la problemo. Ili movis la fornon por varmigi bolton pli proksimen al la boltotaj ŝtalpecoj, altiĝis ĝian temperaturon, rapide ŝovis la inkandeskan bolton en la truon kaj rapide ĝin martelis. Tiamaniere ili sukcesis bonkvalite fiksi la pli ol 2,100 boltojn, per sia simpla metodo.

Kiam la ŝtalaj traboj 20 metrojn longaj ĉiu kun pezo de ĉirkaŭ 4 tunoj estis elfaritaj, oni devis ilin starigi sur la pilierojn. Por tion fari, ordinare oni bezonas longbrakan arganon. Sed tian maŝinon ili ne havis. Kion fari do? Ili mobilizis la saĝon de la amaso kaj fine sukcesis plenumi la taskon glate kaj sekure. La du pordoformaj fostoturoj kun alteco de 15 metroj estis starigitaj, la ŝtonaj alkondukaj partoj de la ponto kun longeco de 270 metroj finkonstruiĝis, 14 ŝtalaj kabloj ĉiu kun pezo de pli ol 2 tunoj instaligiĝis al la ŝtalaj pordoformaj fostoturoj, tiel ke la ponto alte pendas super la Flava Rivero.

III

La ponto-konstruado ricevis grandan subtenon de la laborista klaso. Tri veldistoj kaj unu beton-preparisto de la Langou-a Fervoja Administracio kaj la Gansu-a Metalurgia Kompanio venis al la konstruejo kaj instruis al la frataj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj bezonatajn teknikojn. Laboristoj de la Langou-a Universala Maŝin-fabrika prilaboris parton de la gravaj ekipaĵoj de la ponto. Entute pli ol 20 industriaj unuoj forte subtenis la konstruadon de la ponto.

Finkonstruiĝis la ponto. Ĝi staras super la Flava Rivero kvazaŭ bela ĉielarko.

La 20-an de majo en la kuranta jaro, tie flirtis ruĝaj flagoj, svarmis ĝojaj homamasoj. Bele ornamitaj aŭtoj plenaj da homoj glate veturis unu post alia tra la ponto. Ĝoje saltante la homamasoj laŭdas la heroan faron de la komunumanoj.

Nove Elfositaj Valoregaj Historiaj Restaĵoj

DUM la Granda Proletara Kultura Revolucio, niaj arkeologiaj laborantoj faris grand-skalan protekton kaj elfosadon de historiaj restaĵoj, elfosis kaj science traktis multajn historiajn lokojn kaj antikvajn tombojn kaj malkovris grandan kvanton da valoregaj historiaj restaĵoj. Tiuj restaĵoj havas grandan sciencan valoron por studi pri politiko, ekonomio, kulturo kaj militaj aferoj kaj la amikaj kontaktoj inter Ĉinio kaj fremdaj landoj en diversaj historiaj periodoj de Ĉinio.

Kamarado Maŭ Zedong montris: “Alia tasko de nia studo estas studi nian historian heredaĵon, doni al ĝi kritikan resumon per la marksisma metodo. Nia nacio havas historion de kelkmil jaroj, havas siajn trajtojn kaj multajn trezorojn.” Multaj el la historiaj restaĵoj elfositaj de diverslokaj amasoj kaj arkeologiaj laborantoj en la kultura revolucio estas maloftaj aŭ unuafoje malkovritaj. Ekzemple,

la du antikvaj tomboj de Liu Ŝeng, princo de Ĝongŝan, kaj lia edzino Doŭ Van de Okcidenta Handinastio (pli ol cent jaroj antaŭ Kristo) eltrovita en 1968, ĉe Manĉeng de Hebej-provinco, estas elhakitaj en roka monto. La malfacileco kaj skalo de la konstruoj estas kompareblaj kun tiuj de subtera palaco. En tiuj tomboj oni trovis diversajn bronzaĵojn, arĝentaĵojn, jadaĵojn, fajencaĵojn, lakaĵojn, silkaĵojn, ilojn por ĉaroj kaj ĉevaloj kaj aliajn entute pli ol 2,800 objektojn entombigitajn por funebro. La alta nivelo de tiuj objektoj estas tre alta. Inter tiuj restaĵoj estas 2 “orfadenaj jadvestoj”, kiajn oni neniam trovis antaŭe. Ili estas faritaj el kvarangulaj maldikaj jadpecetoj kunligitaj per delikataj oraj dratoj tra la truetoj ĉe iliaj anguloj. Tiuj vestoj estis surmetitaj al la mortintoj sen subvesto kun la intenco preventi la kadavrojn de putriĝo. Kiam oni trovis ilin, la kadavroj jam polviĝis kaj parto de la oraj fadenoj kaj

Multaj alilandaj gastoj pririgardis en Pekino du “orfadenajn jadvestojn” elfositajn el du antikvaj tomboj de Okcidenta Handinastio en la Granda Proletara Kultura Revolucio de nia lando. Jen Ne Win, la prezidanto de la Revolucia Komitato de la Federacia Respubliko de Birmo, lia edzino kaj liaj sekvantoj ilin pririgardas.



jadpecoj jam rompiĝis. Nun post prilaboro oni jam tute restarigis iliajn originajn formojn. Tiuj historiaj restaĵoj profunde malkaŝis la diboĉan vivon de la feŭda reganta klaso kaj ĝiajn kruelajn ekspluatadon kaj subpremadon al la laboranta popolo kaj samtempe montris la grandan saĝecon kaj lertecon de la laboranta popolo de Ĉinio en tiu tempo.

En 1966 kaj 1969 oni trovis respektive ĉe Jidu de Ŝandong-provinco kaj Hoŭma de Ŝanhi-provinco tombojn de sklavo enterigitaj kiel funebraj oferaĵoj al la mortintaj mastroj en la epokoj Ŝang (ĉ. 16-a — 11-a jarcento a. K.) kaj Ĝou (11-a — 3-a jarcento a. K.). Tiuj restaĵoj profunde malkaŝis la kruelan klasan subpremon en nia antikva socio.

Je la fino de 1969, oni trovis kaj komencis elfosi Hangia-grentenejon ĉe la orienta ĉefurbo Luojang de la dinastioj Suj (581-618) kaj Tang (618-907). Ĝi estis unu el la famaj grentenejoj en la historio de nia lando. Ĝi okupas areon de pli ol 400,000 kvadrataj metroj kun centoj da grandaj kaj malgrandaj keloj. Sur la registraj brikoj en la grenkeloj gravurigis notoj pri la speco, deveno kaj kvanto de la tenataj grenoj kaj la lokiĝon de la keloj. Tio havigas al ni gravan materialon por studi pri la agrikultura ekonomio kaj kanala transportado de Suj kaj Tang.

En oktobro de 1970, oni elfosis pli ol 1,000 historiajn restaĵojn en kelo tenatajn de Tang-dinastio, ĉe Hegia-vilaĝo en la suda antaŭurbo de Hi-an. Inter ili troviĝas granda nombro da bone konservataj oraj kaj arĝentaj ujoj, cinabro, sukceso, koralo, kvarco, laktoŝtono k. a. drogoj tenataj en arĝentaj skatoloj, arĝentaj granat-boteloj kaj aliaj specialaj ujoj por preparo de kuraciloj kaj ankaŭ juvelaj ŝtonoj, moneroj kaj aliaj objektoj uzataj en komerco en-kaj ekster-landa. Tiuj restaĵoj el la "prospera periodo de Tang-dinastio" estis konservataj en kelo de familianoj de Li Ŝouli, la princo de Bin, en 756 p. K. dum la ribelo de An Luŝan. Tiuj objektoj spegulas la atingojn de la alte disvolviĝinta feŭda kulturo, metiarto, farmacio, scienco kaj tekniko en tiu tempo kaj ili montras ankaŭ la grandan kreivon de la laboranta popolo de nia lando.

La gravaj postrestaĵoj pri la "Silka Vojo" de Tang-dinastio, elfositaj en Turfan-regiono de Hingiang — silkaj kaj linaj teksaĵoj — vivece spegulas la longan historion de komercaj kaj kulturaj rilatoj inter nia lando kaj la landoj de okcidenta Azio kaj Eŭropo. En Turfan-regiono oni elfosis ankaŭ kopion de *Lunju* (Tiel Parolis Kon-



La kopio de «Lunju» klarigita de Geng elfosita en Turfan-regiono, Hingiang



Drogoj tenataj en arĝentaj skatoloj de Tang-dinastio elfositaj ĉe Hegia-vilaĝo de Hi-an en oktobro 1970.

fucio) kun longeco de 5.2 metroj, manskribitan en la kvara jaro de Ginglong-erao, Tang-dinastio (710 p.K.). Ĝi estas la plej antikva el tiaj kopioj ĝis nun trovitaj. Kaj samtempe oni trovis ankaŭ grandan kvanton da aliaj han-lingvaj kopiaĵoj plejparte kun datoj. Tio ĉi bone pruvis, ke la tiama “Okcidenta Regiono” fakte ne diferencis de la interna parto de nia lando.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, en Zoŭhian-gubernio de Ŝandong-provinco oni elfosis fajencaĵojn kaj ŝtonajn instrumentojn de la malfrua periodo de primitiva socio; en Kiŝan de Ŝenhi oni elfosis bronzaĵojn de la frua periodo de Okcidenta Ĝoŭ-dinastio (11-a — 8-a jarcento a.K.); en Gingŝan de Hubej oni elfosis aron da bronzaĵoj de la malfrua periodo de Okcidenta Ĝoŭ kaj en Giangling de tiu sama provinco oni elfosis 25 pentritajn ŝtonajn muzikilojn de Ĉu-regno; en Liu-an, Funan k.a. lokoj de Anhuj grandaj kvantoj de oraj moneroj de Ĉu-regno estas elfositaj; en Ĉangŝa de Hunan-provinco oni elfosis el tombo de Ĉu Muĉun de la malfrua periodo de Printempa-Aŭtuna Epoko (ĉ. 5-a jarcento a. K.) batalilojn — bronzan halebardon, bronzaĵojn go-halebardon kaj lancon ĉiujn kun longa ligna aŭ rotanga tenilo sendifekta; en Ginan oni elfosis fajencaĵojn


akrobatistojn de Okcidenta Han; ĉe Anjang de Henan-provinco oni elfosis fajencaĵojn de Norda Ki (550-577 p.K.); En Datong de Ŝanhi oni elfosis la tombon de Sima Ginlong de Norda Vej kaj trovis en ĝi lak-pentraĵojn sur tabulo, skulptitajn kolonajn bazoŝtonojn kaj ĉerkoliton; en Zoŭhian-gubernio de Ŝandong-provinco oni malkovris tombon de Ĝu Tan (mortinta en 1369), princo de Lu-princlando de Ming-dinastio. En lia tombo oni trovis skribilarojn, liuton, ŝaktabulon, pentraĵojn kaj librojn presitajn en Juan-dinastio; en Pekino oni malkovris pordegon en la protekta ĉirkaŭmurego de la urba pordego Heji de Dadu, la ĉefurbo de Juan-dinastio (1279-1368) kaj postrestaĵojn de loĝdomo kaj fragmentojn de konstruaĵo kaj porcelanaĵojn de Juan-dinastio. Tiuj arkeologiaj trovaĵoj estas valoregaj materialoj por studi la sociojn de diversaj epokoj de nia lando.

En la laboro de protekto kaj elfosado de historiaj restaĵoj, la revoluciaj komitatoj de diversaj lokoj kaj arkeologiaj laborantoj persistis en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, elstarigis proletaran politikon, firme efektivigis la principojn kaj politikojn de la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Vicprezidanto

Lin Biaŭ kiel la vicestro pri protekto kaj elfosado de historiaj restaĵoj kaj serioze alprenis konkretajn paŝojn por efektiviĝi la grandan orientilon de Prezidanto Maŭ **“utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo”**. Per la serĉado de historiaj restaĵoj, ili ne nur studas kaj lernas historion, sed ankaŭ ĝin kombinas kun la ideologia kaj politika edukado, profunde malkaŝante kaj kritikante per la restaĵoj la luksegan diboĉan vivon de la regantoj de diversaj epokoj kaj iliajn kruelajn subpremadon kaj ekspluatadon al la laboranta popolo kaj varme prikantante per ili la laborantan popolon, kiu kreis la historion kaj civilizacion.

Dank’ al serioza studo de la instruoj de Prezidanto Maŭ pri esploro kaj studo kaj kritika akcepto de la historiaj heredaĵoj en la lastaj jaroj, la vastaj laborantaj popolamasoj ankoraŭ pli varme amas la kulturajn heredaĵojn de sia nacio kaj pli profunde konas la gravan signifon por ilin protekti. Kiam la popolanoj trovis historiajn restaĵojn aŭ iliajn spurojn, ili tuj raportas al koncernaj institucioj kaj bone protektas la eltrovaĵojn. La tomboj de Han-dinastio en Manĉeng de Hebej estas malkovritaj de komandantoj kaj batalantoj de la Popola Liberiga Armeo en 1968, dum ĝia elfosado ili kaj revoluciaj amasoj de tiu loko donis multajn helpojn.

En 1969, du membroj de Ĝangĝuang-brigado de Ĝangĝuang-komunumo de Zauĝuang, Ŝandong-provinco malkovris grandan sigelilon de oficiro de Han Lin-er, gvidanto de la Ruĝtuka Armeo — kamparana ribela armeo en la fina periodo de Juan-dinastio, kaj meminitate oferis ĝin al la Muzeo de la Ĉina Revolucia Historio. En 1968, komunumanoj de Hiaŭnangŭang de Venhian-gubernio, Henan-provinco trovis nombron da bronzaĵoj de Ŝang-dinastio dum ebenigo de kampoj. Ili skribis raporton pri la ĝojiga informo kaj portis la restaĵojn al la revolucia komitato de la gubernio. Multaj objektoj el tomboj kaj keloj estas trovitaj de laboristoj dum fundamenta konstruado. La pordego en la protekta ĉirkaŭmuro de la urba pordego Heji de Dadu, la ĉefurbo de Juan-dinastio, estas trovita de laboristoj dum malkonstruado de la urbomuro de Pekino. Ili elfosis la urban pordegon kaŝitan dum pli ol 500 jaroj en la poste konstruita urbomuro kaj helpis la arkeologojn fari zorgan ordigadon. Tio ĉi estas nova aspekto de la protekto kaj elfosado de historiaj restaĵoj de nia lando aperinta en la Granda Proletara Kultura Revolucio. En tiu ĉi raporto ni parolis nur pri parto de la laboro pri elfositaj historiaj restaĵoj en diversaj lokoj de nia lando.



Bronzaĵo de la malfrua periodo de Okcidenta Ĝou-dinastio (antaŭ pli ol 2600 jaroj) elfosita en Ĝingŝan-gubernio de Hubej je julio de 1966. Dekstre: Vinkruĉo de Zengĝong Joŭfu. Maldekstre: Gravurita vortoj sur la kruĉa kovrilo kaj interne de la aperturo.

Malgranda Kemia Fabriko ĉe la Piedo de Ginniu-monto

EN la printempo de 1971, en la Foiro de Ĉinaj Eksportaj Varoj okazigita en Kantono, multaj fremdlandaj amikoj kun granda intereso rigardis ekspoziciaĵon — industrian kemiaĵon de alta polimero polikarbonaton, kiun produktas iu malgranda kemia fabriko. Ili varme laŭdis: “Tiu fabriko plene korpigis la principon de Prezidanto Maŭ pri sinapogo sur propraj fortoj kaj penema lukto kontraŭ malfaciloj en siajn produktaĵojn!” La dirita fabriketo estas la Rezina Fabriko Hiangjang de la urbo Ginan.

La fabriko situas ĉe la piedo de la verda Ginniu-monto en la norda antaŭurbo de Ginan. Ĝi havas nur 200 laboristojn kaj oficistojn kaj produktas polietilenon, polikarbonaton k.a. industriaĵojn. Sin apogante sur laboristoj, ĝi mem konstruis fabrikajn domojn, ekipaĵojn kaj kulturis teknikan forton. Ĉie ĉi tie vidiĝas revolucia spirito de laboristoj en penema entreprenado kaj ilia kreivo.

Vintre de 1965, ĉi tie ankoraŭ estis malplena loko. Ricevinte la taskon de starigo de malgranda kemia fabriko, komunistoj Hu Ĉangjong kaj Hia Pejfa venis tien kun dekelkaj junaj laboristoj sub sia gvido. Por pli frue produkti por la patrolando industriaĵojn ili agis ne laŭ la rutino, t.e. unue konstrui fabrikajn domojn kaj aĉeti novajn ekipaĵojn kaj poste produkti, sed, starigis budojn

el mato kiel fabrikajn domojn, riparis kaj utiligis malnovajn ekipaĵojn kaj mem faris nombron da simplaj ekipaĵoj. Krom tio ili iris al frataj fabrikoj por lerni teknikon. Reveninte ili tuj ekagis. Ili laboris en lernado kaj lernis teknikon en praktiko.


En la komenco ili planis provprodukti polietilenon, sed mankis al ili kaldronego por eksperimento. Ili do aĉetis malnovan kaldronegon. Vidinte tion, iu diris: “Tiu kaldronego ne taŭgas, ĉar ĝi povas elteni nur 0.5 kilogramon da vaporpremo.” Sed, sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ “**Bazo de teorio estas praktiko**” laboristoj mem faris eksperimenton. Ili mezuris la dikecon de la kaldronego, ekzamenis ĝian kvaliton kaj faris eksperimenton de akvopremo. Post ekzameno ĉiuj opiniis, ke kvalito de la kaldronego tute povas elteni la bezonatan vaporpremon. Por certigi sekurecon en produktado ili decidis unue fari eksperimenton de vaporpremo. Kvankam la eksperimento montris ĝian fidindecon, tamen ankaŭ ekzistis certa danĝero. Laboristoj diris: “Por pli frue produkti polietilenon, ni nepre superos ĉiujn malfacilojn por fari eksperimenton.” Anstataŭ ripozi en dimanĉo Hia Pejfa kaj juna laboristo Vang Giacun meminciate iris al la fabriko kaj ekhejtis la kaldronegon. Pli kaj pli ardiĝis la fajrego



Orumita bronza lanterno de Ĉanghin-palaco trovita en antikva tombo de Okcidenta Han-dinastio (je la fino de la dua jarcento a. K.), ĉe Manĉeng de Hebej-provinco, en 1968.




Fajencaj akrobatistoj de Okcidenta Han-dinastio (206-24 a. K.) elfositaj ĉe Ginan de Ŝandong-provinco en 1969.



Bronza vinkruĉo de Ŝang-dinastio (ĉ. 16-a jarcento — 11-a jarcento a. K.) eltrovita en Ninghiang de Hunan-provinco, en la jaro 1970.


Agata pokalo inkrustita per oro kun formo de bovkapo de Tang-dinastio (650-755 p. K.) elfosita en antaŭurbo de Hi-an, Ŝenhi-provinco, en la jaro 1970.





Ora bovlo kun gravurita desegno de Tang-dinastio (650-755 p. K.) elfosita en antaŭurbo de Hi-an, Ŝenhi-provinco, en la jaro 1970.

Trikolora nigra ĉevalo de Tang-dinastio (618-907 p.K.) elfosita ĉe Luoĵang de Henan-provinco, en la jaro 1971.



Flava glazurita plata porcelana botelo de Norda Ki (550-577 p. K.) elfosita ĉe Anĵang de Henan-provinco, en la jaro 1971.







Orumita bronza skatolo por frotplato de ĉina inko kun besta formo de la meza periodo de Orienta Han-dinastio (ĉ. 117-145 p.K.), elfosita ĉe Hjuĝou de Giansu-provinco, en la jaro 1969.

Boŝan-incensujo inkrustita per oro de Okcidenta Han-dinastio (la fino de la dua jarcento a. K.) elfosita ĉe Manĉeng de Hebej-provinco en la jaro 1968.

Arĝenta kruĉo kun desegno de ĉevalo de Tang-dinastio (650-755 p.K.) elfosita en antaŭurbo de Hi-an de Ŝenhi-provinco, 1970.





Fajenca ruĝa ding-o (kuirilo) kun desegno de malfrua periodo (antaŭ ĉ. 4000 jaroj) de la primitiva socio elfosita de Zoŭhian-gubernio de Ŝandong-provinco, 1971.




Bronza vinkruĉo kun formo de strigo de Ŝang-dinastio (ĉ. 16-a — 11-a jarcento a. K.) eltrovita ĉe Ĉangŝa de Hunan-provinco, en la jaro 1966.

Brokato kun desegnoj de floroj kaj birdoj kaj brokataj ŝuoj kun nubo-forma kapo de Tang-dinastio (618—907 p. K.) elfositaj en Turfan-regiono de Hingiang dum la periodo de 1966 ĝis 1969.





Oraj moneroj de la regno Ĉu (5-a jarcento — 3-a jarcento a.K.) elfositaj ĉe Liu-an kaj Funan de Anhuĵ-provinco, en la jaroj 1969 kaj 1970.



Plata porcelana kruĉo kun blua desegnaĵo de Juan-dinastio (1271-1368 p. K.) elfosita ĉe Pekino en 1970.



La Rezina Fabriko Hiangjang

kaj iom post iom leviĝis la montrilo de manometro de la kaldronego. Starante ĉe la kaldronego ili aplombe rigardis la moviĝantan montrilon de manometro: 2 kg., 3 kg., 4 kg.... la montrilo leviĝis super la bezonatan vaporpremon. "Sukcesis la eksperimento de vaporpremo!" Ĝojiga informo rapide disvastiĝis inter la laboristoj.

Ĝuste dank' al tiuj simplaj ekipaĵoj, la kadroj kaj laboristoj sinsekve faris provprodukton de polietileno, venkis relative grandajn malfacilojn en tekniko kaj sukcese produktis plurajn variojn de polietileno.

Ĝuste kiam la rezina fabriko metis unuan bazon en sia konstruado, la ŝtato asignis al ĝi taskon produkti polikarbonaton.

Polikarbonato estas fortika plasto uzata en moderna industrio. En produktado de tiu kemiaĵo

per nova teknologio, ja estas multaj malfaciloj por tiu ĵus starigita malgranda fabriko. Ĉu peti helpon de la ŝtato aŭ solvi la problemon per siaj klopodoj, same kiel en provproduktado de la aliaj kemiaĵoj? Pensante pri la malfacila entreprenado de sia fabriko, la laboristoj profunde komprenis: Ja gravas la materia kondiĉo, sed pli gravas la revolucia spirito de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema lukto en malfaciloj. Kun tiu spirito oni povas krei bonan kondiĉon kaj venki kiom ajn grandajn malfacilojn.

Tuj poste, oni studis la projekton pri provproduktado de nova kemiaĵo. Por plej rapide posedi produktan teknikon, la fabriko sendis Vang Giacun aliloken por lerni. Pro malmulte da legoscio kaj manko de kemia scio, li renkontis multajn malfacilojn en lernado. Tamen li, kiu multe suferis en la malnova socio kaj fariĝis mastro de



la ŝtato post la Liberiĝo, ne submetiĝis antaŭ la malfaciloj. Laŭ lia opinio, la malfaciloj estas venkeblaj kaj ĉia riĉaĵo de la socio estas kreita de laborantaj amasoj. En la lernado li notis ĉiujn kemiajn signojn fremdajn por li kaj ilin ripetade legis kaj parkeris. Li ne povosciis legi desegnaj materialojn, do li mem desegnis ekipaĵon kaj poste petis de veterana laboristo klarigon. Ĝuste kun tiu obstina persistemo li, kiu vizitis lernejon nur du jarojn, fine posedis la produktan teknikon.

La tuta provprodukta laboro estis farita laŭ la

principo de sinapogo sur propraj fortoj kaj ŝparemo. Por aĉeti tenujon de karbona monooksido, gravan ekipaĵon en produktado de polikarbonato, necesas elspezi 70,000—80,000 juanojn. Laboristoj diris: "Por ŝpari monon ni faru ĝin per niaj propraj metodoj." Ili do anstataŭigis ĝin per reformita tenujo de acetono. Por preventi eksplodon, ili faris sur la tenujo aperturon kaj ĝin hermete kovris per kaŭĉuka plato, laŭ la principo de sekura klapo de kaldronego. Por tiu ekipaĵo estis elspezitaj nur 2,000 juanoj.

La fabriko finkonstruis laborejon de polikarbonato nur en 46 tagoj. Por la tuta kompleto da ekipaĵoj oni elspezis nur pli ol 60,000 juanojn kaj tiel ŝparis 95 % de la kosto por aĉeti kompletan da specialajn ekipaĵoj.

En la lasta procedo de provprodukto — plena funkciigo de la maŝinoj, tiu kompleto da ekipaĵoj eltenis ĉiujn provojn kaj sukcese produktis laŭnorman polikarbonaton.



Fari sciencon eksperimenton por senĉese altigi kvaliton de la produktaĵoj



JAN BAŬGIANG*:

Turni Malabundan Sezonon en Abundan

NIA brigado Puhuang-ju ĉefe produktas legomojn. Same kiel aliaj agrikulturaj plantaĵoj, la legomoj kreskas sub la influo de klimato. En la plejparto de norda Ĉinio, ĝenerale multe da legomoj produktiĝas en somero, kaj malmulte en vintro kaj printempo. Tial estiĝas kontraŭdiro inter la malegaleco de legomprodukto en la malsamaj sezonoj kaj la bezono de legomoj dum la tuta jaro. Tiu kontraŭdiro plej akre montriĝas en aprilo, aŭgusto kaj septembro. En aprilo de ĉiu jaro, kiam la konservataj brasikoj kaj rafanoj estas forkonsumitaj, la foliaj legomoj semitaj en frua printempo ankoraŭ ne sufiĉe grandiĝas, kaj sekve aperas periodo de manko de legomoj. En aŭgusto kaj septembro, la frue semitaj fazeolo, kukumo, melongeno, kapsiko, tomato k.a. plejparte velkas kaj la malfrue semitaj rafano kaj brasiko ankoraŭ ne maturiĝas, kaj ankaŭ tiam estas periodo de manko de legomoj. Tiuj du periodoj de malabundeco starigis antaŭ ni problemon en provizo de legomoj.

Por solvi tiun problemon, la revolucia komitato de la brigado organizis la komunumanojn studi la filozofiajn verkojn de Prezidanto Maŭ *Pri Kontraŭdiro* kaj *Pri Praktiko*, kaj serioze analizi diversajn kontraŭdirojn kaj la rilatojn inter ili en la malabundaj sezonoj de produkto de legomoj. Ili ekkonis, ke la kaŭzo de malabundeco de legomoj en aprilo kuŝas en tio, ke malrapide kreskas la legomoj semitaj en aŭtunfino aŭ frua printempo pro la malalteco de la grunda temperaturo kaj ne povas

esti liverataj ĝustatempe al la merkato. Do la malalteco de la temperaturo estas la ĉefa kaŭzo de la malabundeco en aprilo. Ni do faris klopodojn por levi la temperaturon de la grundo. Ni prenu spinacon kiel ekzemplon, en la pasinteco ni ĝin semis en la lasta tagdeko de septembro kaj starigis kontraŭventajn barilojn por protekti la legomojn de atako de frosta vento antaŭ la alveno de vintro. Nun, krom ĝustatempe irigacio, aldono de sterko kaj kovro per tero por ke la radiko kaj folioj havu sufiĉe da akvo kaj sterko kaj pli grandan rezistan povon kontraŭ malvarmo, ni ankaŭ aldonas pajlan kovrilon kaj plastan membranon en februaro de la sekvanta jaro por arte fari "varman klimaton" kaj akceli la kreskadon de spinaco, kiam la grunda temperaturo komencas leviĝi. Dank' al tiu aranĝo, spinacon oni povas liveri al la merkato je la fino de marto aŭ la komenco de aprilo, kaj per tio plenigi la mankon de legomo en aprilo. Alia ekzemplo koncernas fenkolon, printempan brasikon k.a., kun malgranda rezista povo kontraŭ frosto kaj mallonga kreska periodo. En la pasinteco, ni semis en la meza kaj lasta tagdekoj de marto kaj povis liveri maturajn legomojn nur en la lasta tagdeko de aprilo. Nun, antaŭ la semado ni starigas kontraŭventan barilon kaj kovras la bedojn per pajlaj kovriloj por levi la temperaturon de la grundo. Dank' al tiu aranĝo, ni povas semi pli frue en la unua tagdeko de marto tiel ke la plantidoj post sia elteriĝo povas kreski plue sub la protekto de la kovrilo. Post zorga flegado dum pli ol unu monato, ni povas liveri legomojn en la unua tagdeko de aprilo.

*La komunumanoj atente fle-
gas legomidojn.*



Se spinaco, printempa brasiko kaj kelkaj aliaj legomoj povas maturiĝi pli frue ol kutime, ĉu la fruktodonaj legomoj povas maturiĝi antaŭ la kutima tempo? La supre dirita aranĝo povas garantii temperaturon necesan por la kreskado de foliaj legomoj, sed ne taŭgas por la fruktodonaj legomoj, ĉar la lastaj povas flori kaj frukti ĝenerale en la temperaturo de pli ol 20°C. Por krei medion kun temperaturo de pli ol 20°C en printempa frostoj, ordinaraj oni uzas vitran domon. Sed tiu rimedo estas multekosta kaj bezonas multan laboron kaj ne taŭgas por grandarea produktado. Nun ni aplikas novan metodon por solvi tiun problemon, nome kovri la bedojn per plasta membrano sur arkaj

framoj, aldoni pajlan kovrilon sur la membrano kaj starigi apud la bedoj barilon por ilin ŝirmi de vento. Ĉiutage post la sunleviĝo, ni formovas la pajlajn kovrilojn por ke sunradioj enpenetru en la bedojn tra la membrano; post la sunsubiro, ni rekovras la pajlajn kovrilojn por teni la temperaturon je pli ol 20°C en la bedoj, kaj tiamaniere garantii regulan kreskadon de la fruktodonaj legomoj. Tiu ĉi rimedo estas nemultekosta, facile aplikebla kaj povas esti uzata en grandarea produkto. En la pasinteco, oni povas liveri kukumon nur en la meza kaj lasta tagdekoj de majo, sed nun jam povas vendi kukumon en la meza tag-

deko de aprilo, kaj krome ankaŭ la produkta kvanto multe grandiĝis.

La ĉefa kontraŭdiro en la malabunda produkto de legomoj en aprilo estas la malalteco de temperaturo. Sed ankaŭ la koncentra maturiĝo de legomoj kaj nekontinua liveriĝo al la merkato estas grava faktoro kaŭzanta malabundan sezonon. Tial, en ŝanĝado de la malabunda sezono, unuflanke ni klopodis solvi la problemon de malalteco de temperaturo per nia ĉefa forto, kaj aliflanke ni donis atenton por movi popolamasojn elkulturi kaj enkonduki bonajn speciojn kaj pliapaŝe provis serĉi la leĝojn de kreskado de legomoj kaj klopodis turni malabundan sezonon en abundan.

Foje, la estro de la sepa produkta grupo Jan Venhiu kaj teknikisto Hju Venkjuan hazarde rimarkis, ke iu pintorompita kukuma tigo kun kvar folioj donis florojn ĉe disbranĉigejoj kaj donis tri kukumojn antaŭ la kutima tempo. Tiu fenomeno altiris ilian atenton. Tiuj du veteranaj kamparanoj cerbumadis pri tiu kukumo en ligo kun sia multjara praktika sperto kaj analizis la kaŭzon kial la difektita tigo donis fruktojn antaŭ la kutima tempo. En la pasinteco, kulturante kukumon, oni derompis la tigopintojn nur tiam, kiam ĝi ekhavis dekelkajn foliojn kaj surgrimpis subtenilon. Ĉar tiam la nutraĵo estas konsumita de la folioj, tial la planto donas fruktojn malfrue. La planto kun kvar folioj kaj derompita pinto povis doni frukton antaŭ la kutima tempo probable pro tio, ke la nutraĵo estis koncentrata kaj akcelis la floriĝon kaj fruktodonon. Kun tiu ĉi opinio, ili ŝanĝis la kutiman agmanieron derompi la pintojn de la plantoj nur post kiam ili surgrimpis la subtenilojn, kaj faris eksperimenton de antaŭtempa derompo de la tigopintoj. Post multfoja ripetado de praktiko, konado, denova praktiko kaj denova konado, ili eltiris sperton de laŭperioda derompo de la plantopintoj, nome ili derompas la tigopintojn en malsamaj periodoj, kiam ĉi tiuj havas 7,8,9 aŭ 10 foliojn. Dank' al tio ili povas frue maturigi iujn kukumojn kaj krome ankaŭ igi ilin fruktodoni en malsamaj periodoj kaj tiel garantii simetrian liveradon al la merkato.

Post la solvo de la malabunda produktosezono de aprilo, ni analizis la produktadon de legomoj en aŭgusto kaj septembro kaj trovis, ke en tiuj du monatoj grandakvante liveriĝas al la merkato fruktaj legomoj. La fruktaj legomoj karakteriĝas per tio, ke ili unue donas florojn kaj poste fruktojn. En multjara praktikado ni trovis, ke ĝuste en tiu sezono multaj fruktaj legomoj frue faligas siajn florojn kaj ne povas doni fruktojn,

kio kaŭzas redukton de la produkto kaj malbone influas la provizadon. Ekzemple, la somere semita fazeolo floras kaj donas guŝojn ĝuste en la alttemperatura pluva sezono, kaj la floroj sur la malsupra parto de la plantoj plejparte defalas pro pluvado kaj arda sunumo post pluvo, kio malpliigas produkton en la frua periodo. Surbaze de tiu kono, ni plifruigis la tempon por semi fazeolon. Dank' al tiu aranĝo, fazeoloj povas flori kaj doni guŝojn antaŭ la alveno de la pluva sezono kaj eviti defalon de floroj. Kaj krome, post ĉiu varma pluvo, ni tuj irigacias por malaltigi la temperaturon de la grundo por garantii bonan kreskadon de la plantoj. Dank' al apliko de tiu aranĝo, la norma produkto-kvanto de fazeolo en frua periodo estas fundamente garantiata kaj unuapaŝe ŝanĝis la malabundecon de legumenoj en aŭgusto kaj septembro. Poste, laŭ la sama principo ni direktas la kulturadon de aliaj somere semitaj fruktodonaj legomoj, konvene plifruigis la tempon de semado de kukumo, tomato, melongeno ktp. kaj gajnis relative bonan efikon. Dank' al apliko de tiuj aranĝoj, de la 10-a de aŭgusto ĝis la 20-a de septembro en la pasinta jaro, nia brigado liveris al la merkato sume pli ol 1,400 tunojn da legomoj kun 40-pocenta plimultiĝo kompare kun tiu de la sama periodo en 1969. Kaj la nombro de specoj plimultiĝis de pli ol 20 ĝis pli ol 60.

Por ŝanĝi la malabundan sezonon de legomo kaj efektiviĝi simetrian liveradon en la tuta jaro, unuflanke ni klopodis por "fruigi" la liveradon de certaj legomoj al la merkato, kaj aliflanke ni klopodis por "malfruigi" la velkon de certaj legomoj, kaj dank' al apliko de la metodo kovri aŭtunajn kukurbon kaj tomaton per plasta membrano, ilia kreska periodo longiĝas de la komenco de oktobro ĝis novembro. Tiamaniere, la nombro de la kreskaj periodoj de kukumo en ĉiu jaro kreskis de 4 ĝis 8, kaj la tempo de provizado de ili al la merkato plilongiĝis de 4 monatoj ĝis 7 monatoj. La nombro de kultivaj fojoj de tomato kreskis de 2 ĝis 6 kaj la tempo de provizado longiĝis de pli ol 3 monatoj ĝis pli ol 7 monatoj.

En la dujara praktikado ni akiris unuapaŝajn sukcesojn. Depost nun, ni devas pli diligente studi kaj apliki la brilan filozofian penson de Prezidanto Maŭ, pliapaŝe esploras la leĝojn de kreskado kaj provizado de legomoj, por produkti pli multe da legomoj kaj kontentigi la bezonon de la vivo de la popolo.

**La verkinto estas sekretario de la ĝenerala partia filio de Puhuang-ju-brigado de Fengtaj-kvartalo de Pekino.*



Ĉe la Haveno Huangpu



LA haveno Huangpu de Kantono estas la suda pordo de nia lando kaj ĉiujare ĝi akceptas milojn kaj milojn da maristoj kaj amikoj venintaj de diversaj lokoj de la mondo. En kontakto kaj kuna laborado, la popolo kaj havenaj laboristoj de nia lando kaj ili lernas unu de alia kaj helpas unu alian. Aperis multe da rakontoj pri unuiĝo kaj amikeco inter ili.

EKSTERORDINARE GRANDAJ LEDŜUOJ


Du junaj jugoslavaj maristoj ĝoje revenis al sia ŝipo kun du skatoloj. Kamaradoj demandis ilin: "Kion bonan vi aĉetis sur la bordo?" Ili respondis: "Vi rigardu!" Oni malfermis la skatolojn kaj vidis du parojn da novaj eksterordinare grandaj ledŝuoj.

La du maristoj estas tre altaj kaj ofte ne povis trovi por si sufiĉe grandajn ŝuojn en vendejoj. Veninte al Ĉinio, ambaŭ ili deziris akiri taŭgajn ledŝuojn. Kiam la ŝipo ankris en la haveno Huangpu, ili surbordiĝis kune. Laborantoj de ŝua butikoj "La Sudo" de Kantono varme akceptis ilin.

Sed en la butikoj ne estis tiel grandaj ŝuoj konformaj al ili. La laborantoj pensis: La du amikoj venis de tre malproksima lando, do ni ne devas lasi ilin foriri malespere. Ili decidis tuj fari por ili du parojn da ledŝuoj. Laborantoj de la butikoj zorge mezuris iliajn piedojn kaj diris al ili: "Venu morgaŭ por preni ŝuojn."

La sekvantan antaŭtagmezon, la du maristoj venis al la butikoj kaj oni prezentis al ili du parojn da grandaj ledŝuoj. La modaj ŝuoj bone sidis al iliaj piedoj. Ili tre ĝojiĝis kaj diris firme premante la manojn al la laborantoj: "Multajn dankojn al vi, ke vi faris ŝuojn por ni en nokto."

Rakontinte al siaj kamaradoj pri la deveno de la ŝuoj, la du junaj maristoj diris admire: "Nur



*Alilandaj maristoj kune
kun niaj havenaj labo-
ristoj en amuzado*

tiuj, kiuj agas laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ Zedong, povas tiel sincere servi al la popolo!”

“TIO ESTAS NIA INTERNACIISMA DEVO”

Tagmeze de la 12-a de julio de la kuranta jaro, la kuba ŝipo “Imias” veturis sur Perlo-rivero. Kiam ĝi proksimiĝis al la havena regiono, la vetero subite malboniĝis: plumbaj nuboj ruliĝadis en la ĉielo, furioza vento levis altajn ondojn kaj baldaŭ pluegos. Kamarado Ĉen Dajen, piloto de nia haveno, vidis en streĉo, ke sur malproksima akvo estis du homoj krientaj por helpo svingante ĉapojn. Li tuj diris tion al la apude staranta kuba kapitano. La kapitano rigardis per binoklo kaj tuj ordonis: Du

ĉinaj amikoj troviĝas en danĝero. Tuj haltigu la ŝipon por ilin savi! Je lia ordono, la maato, dua helpanto de kapitano, k.a. sume 7-8 kubaj amikoj kune kun piloto Ĉen Dajen veturis per savboato al la loko malgraŭ vento kaj ondoj. Ili trovis ke iu boateto estis splitigita de ondegoj kaj dronanta. La du komunumanoj sur la boateto obstine luktis kontraŭ la ondoj. En tiu tre danĝera momento, atingis ilin la savboato. La du komunumanoj suriris la boaton kaj la maristoj elakvigis ilian rompitan boateton kaj remilojn kaj trenis ĝin al la ŝipo “Imias”.

Sur la ŝipo la du komunumanoj estis varme zorgataj de la kapitano kaj ŝipanoj. La du komunu-

manoj ŝanĝis la vestojn kaj kubaj amikoj kovris ilin per lanaj litaĵoj kaj donis al ili varmajn manĝaĵojn kaj supon. Kiam la savitoj reakiris la forton kaj pretis reveni per komunika ŝipeto de la haveno, ilia difektita boateto jam estis fortike riparita de la kubaj amikoj per sia propra materialo.

La proletara internaciisma spirito de la kubaj amikoj profunde kortuŝis la du komunumanojn. Ili diris: "Sen via ĝustatempa helpo, la rezulto estus tragika! Ni neniam forgesos la amikecon de la kuba popolo al la ĉina popolo." La kubaj amikoj modeste diris: "Tio estas nia internaciisma devo. Transdonu niajn salutojn al la membroj de via komunumo."

KUNE VENKI ŜTORMON

En la nokto de la 16-a de junio tajfuno n-ro 8 sovaĝe surbordiĝis ĉe la elfluejo de Perlo-rivero. Ŝtormo levadis ondegojn kaj pluvegis torente. En la Pilota Stacio ĉe la buŝo de Perlo-rivero, starante ĉe fenestro piloto absorbite observadis la ŝipojn balanciĝantajn sur la maro. Subite eksonoris telefono. Oni kriis "Vjetnama ŝipo 'Hoa Binh' preterpasas la elfluejon de Perlo-rivero kaj petas sin ŝirmi de uragano en nia haveno. Vi venke plenumu la taskon de pilotado." Demetinte la

parolilon, la piloto pensis: La vjetnama ŝipo plenumas batalan taskon de la kontraŭsona naciisava milito, do ni nepre devas helpi ĝin per ago.

Per komunika boateto du pilotoj atingis la ŝipon "Hoa Binh" kaj la kapitano varme kondukis ilin en la stirejon. Ili kune mezuris la fortecon kaj direkton de la ventego kaj kune batalis. Ĉar la direkto de la ventego estis ŝanĝiĝema, la kapitano decidis, post interkonsiliĝo kun la pilotoj, ĵeti du anĵorojn por fiksi la ŝipon.

Pro la furioza ŝtormo kaj ondegoj la ŝipo senĉese balanciĝis. La kapitano, pilotoj kaj aliaj kamaradoj estis tramalsekigitaj de pluvakvo kaj plejparto de la ŝipanoj ekvomis kaj kapturiniĝis, sed ili persistis sur siaj postenoj kaj obstine luktis kun la ventego kaj ondegoj. Post malfacilega lukto en du tagnoktoj ili venkis la fortan tajfunon. La kapitano pretervole skribis sur papero: "Dankon pro la helpo al ni fare de la laboristaro gvidata de Prezidanto Maŭ Zedong." La piloto transprenis la plumon kaj skribis daŭrige: "Ni lernu de la brava vjetnama popolo!"

La duan horon posttagmeze de la 19-a, la tajfuno ĉesis. Kun batala amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Vjetnamio, la ŝipo "Hoa Binh" denove komencis sian navigadon.



Inaŭguro de Bethune-vojo

INAŬGURO de Bethune-vojo estis okazigita je la 1-a de aŭgusto en la kanada urbo Gravenhurst, la hejmurbo de D-ro Norman Bethune, granda batalanto de internaciismo.

La ceremonio estis aranĝita de la konsilantaro de Gravenhurst kaj komenciĝis je la 3-a posttagmeze. Ĝin partoprenis urbestro Cecil Schell, membroj de la konsilantaro kaj nombro da urbanoj. Cecil Schell tondis la inaŭguran rubandon kaj faris paroladon. Li anoncis, ke la vojo estas oficiale

nomata Bethune-vojo, kaj poste signifostis kun la surskribo Bethune-vojo estis starigita.

Ankaŭ la Komerca Delegacio de la Importa kaj Eksporta Kompanio de Greno, Oleo kaj Manĝaĵo de Ĉinio vizitanta al tiu urbo partoprenis la ceremonion kaj esprimis la respekton kaj karmemoron de la ĉina popolo al D-ro Bethune. Post la ceremonio, membroj de la ĉina komerca delegacio vizitis, en akompano de urbestro Cecil Schell kaj membroj de la konsilantaro, la domon, en kiu D-ro Bethune naskiĝis kaj loĝadis.

Novaj Venkoj de la Tri Hindoĉiniaj Popoloj

ALTE tenante la brilan standardon de unuiĝo kaj batalo kaj bone kunagante unu kun alia en la komuna batalo, la tri hindoĉiniaj popoloj refoje frakasis novajn militajn aventurojn de la malamiko kaj akiris novajn venkojn kun granda strategia signifo en la unua duono de 1971.

NOVAJ MILITAJ AVENTUROJ DE LA MALAMIKO FIASKIGITAJ SUR LA UNUĜINTAJ 3 BATALEJOJ DE HINDOĈINIO

Je la komenco de la kuranta jaro, la usona imperiismo lanĉis atakon kontraŭ la malsupra Laoso kaj la nordoriento de Kamboĝo per grandaj armitaj fortoj, kun vana espero rompi la revoluciajn ligojn inter la tri landoj kaj ekstermi iliajn revoluciajn fortojn. La 3 popoloj de Hindoĉinio kun alta singardemo travidis la intrigon de la usona imperiismo, subtenis unu alian sur la batalejoj per kunagaj bataloj kaj fiaskigis militajn aventurojn de la malamiko. La armeoj kaj popoloj de Laoso

kaj suda Vjetnamio kunage batalis ĉe la ŝoseo n-ro 9, ekstermis grandan kvanton da vivaj fortoj de la malamiko kaj multe militkaptis kaj detruis ĝiajn militajn ekipaĵojn. La kamboĝaj armeo kaj popolo frakasis ofensivon de la malamiko en la nord-orienta parto de la lando kaj tiel donis al ĝi solidan frapon. En majo, la laosaj armeo kaj popolo antaŭenmarŝis en venko, konkeris Pak Song, Houi Cong, Houi Sai kaj aliajn fortikigitajn punktojn kaj liberigis la tutan Boloven-altebenejon. La sudvjetnamaj armeo kaj popolo faris furiozan atakon kontraŭ la malamikaj fortikaĵoj ĉe la limregiono kaj detruis gravan bazon de la usona armeo ĉe Dong Tri. La peniga kaj brava batalo de la hindoĉiniaj popoloj pli kompakte ligis la 3 hindoĉiniajn batalejojn.

DIVERSAJ TAKTIKOJ DE LA MALAMIKO FRAKASITAJ KAJ PARTO DE ĜIAJ PLEJ ELITAJ VIVAJ FORTOJ EKSTERMITA

En februaro, por gajni militan venkon, la usona imperiismo koncentre uzis grandan nombron da

Kun spirito de "firma decido batali kaj venki" kaj por plene fiaskigi la usonajn agresantojn, la Vjetnama Popola Armeo faras militan ekzercon de artilerio kaj infanterio.






Batalantoj de la Laosa Popola Liberiga Armeo marŝas en venko.

aviadiloj, kanonoj, tankoj, kirasaŭtoj kaj aliaj modernaj armiloj por fari t.n. fajran subtenon kaj ekspedis la strategian rezervan forton de la saĝona pupa armeo — paraŝutistan divizion, maran infanterian divizion kaj la “atutan” unuan infanterian divizion, asertante, ke ĝi faros “decidan” batalon en la malsupra Laoso. La laosaj armeo kaj popolo koncentris superan forton, detranĉis la kapon kaj

voston de la malamiko, dispartigis, sieĝis kaj ekstermis la entrudiĝintajn malamikojn, kaj frakasis ilian t.n. “helikopteran taktikon”. En la batalo de 43 diurnoj, la laosaj patriotaj armeo kaj popolo komplete ekstermis 4 brigadojn, 2 regimentojn kaj 8 artileriajn batalionojn de la malamiko. Ankaŭ la bravaj sudvjtnamaj armeo kaj popolo heroe batalis ĉe Khe Sanh kaj ekstermis preskaŭ 7000

Tanko de la malamiko detruita de batalantoj de la Kamboĝaj Naciliberigaj Armitaj Fortoj ĉe la ŝoseo n-ro 7



malamikojn, detruis pli ol 860 militajn veturilojn kaj faligis pli ol 230 malamikajn aviadilojn en du monatoj.

La 30-an de majo, la kamboĝaj armeo kaj popolo ekstermis la 8-an regimenton kaj unu kirasan regimenton de la sajgona pupa armeo en Snoul-areo en 3 kaj duona horoj. Fuĝante al la provinco Bin Long de suda Vjetnamio, la restantaj malamikoj trafis embuskon de la sudvjetnamaj armitaj fortoj kaj unu el iliaj batalionoj estis tute ekstermita kaj alia forte frapita.

LA VIGLA GERILA MILITO PEZE BATIS "PACIGAN" INTRIGON DE LA MALAMIKO

Por efektiviĝi la planon de "vjetnamigo" de la milito, Nixon senskrupule faris "pacigajn" kaj "balaajn" operaciojn en suda Vjetnamio. Ili devigis loĝantojn eniri en "strategiajn vilaĝetojn" aŭ "koncentrajn kampejojn de loĝantaro" per bombado, kanonado, ŝutado de kemia tokso, ebenigo de vilaĝoj, detruo de agrikulturaj plantoj kaj aliaj plej kruelaj faŝismaj rimedoj. La heroaj sudvjetnamaj armeo kaj popolo vaste disvolvis gerilan militon. De la provizora dividlinio ĉe n. 1. 17° ĝis la kabo Ca Mau, de la montĉeno Truong Son ĝis marborda ebenejo, la gerilanoj brave batalis

ĉie kaj teruris la malamikojn. En la unuaj 6 monatoj de la kuranta jaro, la sudvjetnamaj armeo kaj popolo detruis 2,260 "strategiajn vilaĝetojn" kaj "koncentrajn kampejojn de loĝantaro" kaj liberigis ĉ. cent vilaĝojn.

Ankaŭ la gerila milito de Kamboĝo kaj Laoso havis grandan disvolviĝon. La kamboĝaj gerilaj taĉmentoj sin puŝis al Phom-Penh kunage kun la Nacia Liberiga Armeo kaj faris Phom-Penh izolita insulo. Kaj la gerila milito de Laoso jam etendiĝis ĝis la ĉirkaŭaĵo de Vientiane.

Pro la brava batalo de la 3 hindoĉiniaj popoloj, la batala spirito de la malamikaj armeanoj ĉiam pli malaltiĝas. La usonaj soldatoj tediĝas de la milito kaj tagnokte sopiras reveni al sia lando pli frue. Dizerto de pupaj armeanoj oftigas kaj ankaŭ iliaj ribelo kaj veno al la popolo ĉiam multiĝas.

La usona imperiismo jam dronis en dilemo de la hindoĉinia milito. La granda venko de la kontraŭusona naciŝava milito de la 3 hindoĉiniaj popoloj donis brilan ekzemplon de tio ke malforta lando povas venki potencon kaj malgranda lando povas venki grandan. Tio multe akcelis la batalon de la mondaj popoloj kontraŭ la usona imperiismo kaj ĉiuj ĝiaj lakeoj.



USONAJ FERVOJISTOJ KAJ DOKISTOJ FARAS STRIKON

Por oponi kontraŭ la reakciaj aranĝoj de la monopolaj kapitalistoj en intensigo de subpremado kaj ekspluatado al laboristoj, dekmiloj da usonaj fervojistoj faris strikon en la 16-a de julio, kaj en la 24-a la striko plie disvolviĝis. Ĝis la 26-a, 125,000 fervojistoj ankoraŭ persistis en la striko.

La striko de la fervojistoj peze batis la usonan monopolan kapitalan klikon. Laŭ informo, kvinono de fervojaj linioj de la tuta Usono jam paraliĝis kaj ĝiaj 17 ŝtatoj estas sub la influo de la striko. La usona asistanta labora sekretario Usery veis: "Ekstreme serioza estas la situacio kaŭzita de paraliĝo de kvar fervojoj." Malgraŭ ke fervojaj kapitalistoj alprenis diversajn rimedojn por malpermesi strikon de laboristoj, tamen fervojistoj daŭre persistis en striko.


Ĝis la nokto de la 26-a de julio, la striko de 15,000 dokistoj de la usona okcidenta marbordo jam daŭris 27 tagojn. Iu usona novaĝ-agentejo alarmis, ke la striko "influis la tutan komercon kaj ekonomion".

STRIKO DE FILIPINAJ LABORISTOJ POR PROTESTI DISKRIMINACION DE LA USONA IMPERIISMO

En la 24-a de julio, 6,000 filipinaj laboristoj de la usona aerforta bazo Clark de Filipinoj faris strikon, postulante, ke la aŭtoritato de la usona bazo rekonu sindikaton de filipinaj laboristoj, reguligu salajron kaj rearanĝu laborojn por laboristoj maljuste eksigitaj.

MANIFESTACIO DE BANKAJ OFICISTOJ DE PORTUGALIO

En la 26-a de julio, 1,500 bankaj oficistoj en Lisbon faris manifestacion por protesti Portugalan aŭtoritaton, ke ĝi arestis maljuste unu bankan oficiston. La manifestaciintoj faris bravan batalon kontraŭ la policanoj, kiuj alvenis por subpremado.



A ŭdiĝas sonora ekfajfo en la placo kaj komenciĝis alloga piedpilka konkurso.

Ĉirkaŭ la placo estas multaj junaj rigardantoj. Ili venis de proksimaj elementaj lernejoj kaj inter ili troviĝas ankaŭ nemalmultaj membroj de piedpilka teamoj. La ludantoj de la du teamoj en konkurso, same ankaŭ iliaj karakteroj, estas konataj por ĉiuj rigardantoj. La sportistoj de la lernejo "Juhong" estas tre spertaj kaj povas trafe enpafi golon de malproksime, tial oni nomas ilian teamon "Aglo"; tiuj de lernejo "Hiangjang" estas tre lertaj kaj povas firme kun-porti piede la pilkon tra longa distanco, dank' al tio ili ofte rapide alproksimiĝas kun la pilko al la golejo de la kontraŭa flanko kaj enbatas la pilkon. Tial oni nomas ilian teamon "Mar-hirundo". En la

antaŭaj konkursoj, la du teamoj venkis ĉiu-foje kaj montris noblan sportan moralon kaj altan arton de pilko-ludo. Nun estas la ĉampionea konkurso en la regiono inter ambaŭ teamoj. La junaj rigardantoj estas tute absorbitaj de la konkurso.

"Brave!" Kiam la unua duono de la konkurso estis tuj finiĝonta, eksplodis aplaŭdo en la rigardantoj: Ĝang Lin de la teamo "Aglo" trafe enpafis golon malproksime. La pilko flugis alte kaj rapide, ke la golulo de teamo "Mar-hirundo" ne povis bari ĝin. Kiam juĝanto pretis proklami ke la teamo "Aglo" akiris unu poenton, Lju Kiang, estro de la teamo "Aglo" tuj levis la dekstran manon kaj laŭte diris: "Ĵus la pilko tuŝetis mian fingro-pinton, tio ne devas esti kalkulata!" Tuj post lia diro, varma aplaŭdo eksplodis sur la placo. Rigardantoj laŭdis: "Kiom nobla estas la sporta moralo!"

Post nelonge, komenciĝis la dua duono de la konkurso. La rekordo restis "O:O". La sportistoj de ambaŭ teamoj ludis pli kaj pli obstine, sed neniu sukcesis akiri eĉ unu poenton. Restis nur kelkaj minutoj ĝis la

fino de la konkurso, tiam subite ŝanĝiĝis la situacio. Centoj da okulparoj fiksiĝis sur Li Hiaŭ-ĉun, la maldekstra sturmento de "Mar-hirundo". Kun helpo de siaj kolegoj, li pelis la pilkon ĝis la loko nur dekelkajn metrojn for de la golejo kaj pafis ĝin al la celo. Sed la golulo de "Aglo" eksaltis kaj repuŝis la pilkon. Kiam li intencis resalti kaj daŭre gardi kontraŭ la pilko, alia sportisto de "Aglo" rapide alkuris kaj stumple falis sur lin. En tiu tempo, la pilko jam ruliĝis al Li Hiaŭ-ĉun kaj estis tre facile por li enbati la pilkon en la golejon. Sed, vidinte ke du sportistoj de sia rivala teamo falis, li tuj alkuris kaj levis ilin. Antaŭ tia nobla revolucia amikeco, la rigardantoj tondre aplaŭdis.

Finiĝis la konkurso: la rekordo restis "O:O", sed kiu donis atenton al tio? La centoj da rigardantoj entuziasme kriis: "Ni lernu de la sportistoj!" En la placo, la sportistoj de ambaŭ teamoj alte levis la kun-premiĝintajn manojn, kaj recitis vorton de Prezidanto Maŭ: "**Disvolu sportajn aktivadojn kaj plifortigu la fizikan kvaliton de la popolo.**" Tiam la aplaŭdo fariĝis pli kaj pli laŭta kaj entuziasma!

De multaj jaroj niaj legantoj ĉiam donas al ni grandan subtenon. Ni, antaŭ ĉio, esprimas nian koran dankon al vi.

Kune kun n-ro 7 de nia gazeto por la kuranta jaro ni dissendis demandojn petante, ke vi afable sciigu al ni viajn opiniojn, proponojn kaj kritikojn pri la diversaj artikoloj kaj bildoj de la aperintaj numeroj de 1971. Multaj el vi fervore kaj serioze plenigis kaj resendis tiujn demandojn al ni sufiĉe rapide. Tio montras la zorgemon kaj favoron de niaj legantoj, kaj ni alte taksas ilian sintenon de amikeco kaj kunlaboro, kio multe kontribuas al la plibonigo de tiu ĉi gazeto.

Ni sincere esperas, ke tiuj legantoj, kiuj ankoraŭ ne plenigis la demandojn, tuj plenigos kaj resendos ilin. "El Popola Ĉinio" povos esti pli bone redaktata nur dank' al nia komuna forto.

Jen estas parto de la respondoj en tri el la demandoj resenditaj.

— La Red.



Plej plaĉas al mi artikoloj pri la vivo de la laboristoj. Ankaŭ pri la milito en Vjetnamio, ktp., ĉar ni ne povas legi la veron en niaj ĵurnaloj.

Mi volas legi artikolojn pri la vivo de la virinoj antaŭ kaj post la revolucio.

Angla legantino F. P.

La artikolo pri Pariza Komunumo estas unu el tiuj, kiuj plej plaĉas al mi. Pariza Komunumo estas unu granda afero, kiun proletaro faris en pasinteco, mi pensas. Ni nepre devas konstrui novan mondon sur tiu brilanta historio de laboristaro. Kvan-kam la komunumo estis detruita de reakciularo, tamen la spirito kaj ideo de tiu komunumo vivadas ĝis nun kaj vivados estonte en la koroj kaj agoj de tiuj, kiuj mal-

amas subpremon de la reganta klaso.

Bildojn pri Pariza Komunumo en aprila numero mi plej ŝatas.

Mi volas legi artikolojn pri edukado nuntempa en Ĉinio. Precipe pri elementa kaj meza edukado, ĉar mi nun studas pedagogion en universitato kaj eble mi fariĝos instruisto.

Japana leganto J. Z.

Ĉiuj bildoj pruvas la tekste prezentitajn progresojn de la

moderna Ĉinio kaj montras la simpatiigajn trajtojn de popolanoj vialandaj kaj belegajn pejzaĝojn de via patrio liberiĝinta el malnovaj katenoj. La multaj fotoj pri akcepto de fremdlandaj delegitaroj tre kontentigis min kiel ilustraĵoj de vialanda deziro pri internacia kunlaboro por la utilo de ĉiuj nacioj; ili montras ankaŭ la daŭre pliiĝantan signifon de Ĉinio en la mondo.

Aŭstria leganto A. H.



NOVAJ ARTAĴOJ

La profesiaj artistoj de la Mara Armeo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo aktive faris kreadon kaj en la lastaj pli ol unu jaro ili kolektive kreis pli ol 200 artaĵojn inkluzive de oleaj pentraĵoj, ĉinstilaj pentraĵoj, gravuraĵoj, guaŝoj, lignogravuraĵoj kaj skulptaĵoj.


Inter ili estas oleaj pentraĵoj "La Granda Gvidanto Prezidanto Maŭ sur Militŝipo", "Intima Instruo", "Feliĉa Navigado" k.a. kiuj prikantas la intiman zorgon de Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin al la Mara Armeo. La olea pentraĵo "Venko de la Unua Mara Batalo", la guaŝo "Kapti Aerbanditon" k.a. prezentis batalojn de komandantoj kaj batalantoj de la Mara Armeo sentime defendantaj la sanktan teritorian maron de la Patrolando. La ĉinstilaj pentraĵoj, novjaraj pentraĵoj kaj skizoj spegulis en diversaj flankoj la revolucion batalan vivon de la komandantoj kaj batalantoj de la Mara Armeo. Ekspoziciate inter la komandantoj kaj batalantoj de la Mara Armeo, tiuj artaĵoj estis bonvenigataj kaj laŭdataj.

Kapti Aerbanditon

FOTO-EKSPOZICIO OKAZIGITA DE LA ĈINA-KUBA AMIKECA ASOCIO

Por celebri la 18-an datrevenon de la kuba tutlanda insurekcio en la 26-a de julio, la Ĉina-Kuba Amikeca Asocio okazigis je la 23-a de junio de 1971 fotoekspozicion pri la "26-a de julio" en la Palaco de Nacia Kulturo.

La ekspoziciataj fotoj spegulis la bravan atakon de la kuba popolo kontraŭ la Moncada Kazerno sub la gvido de kamarado Fidel Castro; malkaŝis la krimon de la despota Batista-reĝimo, la lakeo de la usona imperiismo, en subpremo kaj ekspluato al la kuba popolo; spegulis la sukcesojn de la kuba popolo akiritajn en la aktiva konstruado de sia patrolando post la Liberiĝo.



Renovigu vian abonon jam nun al

El Popola Ĉinio

por ke vi daŭre ricevu ĝin en 1972 sen interrompo. Varbo de novaj abonantoj estas petata kun dankoj. Abonantoj en landoj, en kiuj ne estas nia peranto aŭ kiuj estas nepagipovaj, sin turnu rekte al ni.

Abontarifo				
Landoj		1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Britio	£	0.50	0.75	1.00
Kanado	dol.	2.00	3.00	4.00
Japanio	enoj	320.00	480.00	640.00
Aliaj landoj laŭ la tarifo por Britio.				
Aliaj aziaj kaj afrikaj landoj	brita £	0.25	0.37	0.50
Latinamerikaj landoj	kanada dol.	1.00	1.50	2.00

Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Sur la Kovrilo:

Membroj de la Propaganda Trupo de Nankinaj Ruĝaj Gvardianoj kune kun alilandaj amikoj post sia prezentado

Sur la Dorskovrilo:

Melkistina danco

Korespondi Deziras

Jenaj geesperantistoj el Rumanio dez. kor. kun geesp-istoj alilandaj:

Doina Maria Mironescu, studentino medicina 23-j., complex Studentesc V-45, Cluj.

Oprišan Sanda, studentino 20-j., str. Gh. Lazar 39, Calarasi.

Lazarescu Dan, arkitekto 23-j., Mazepa C-2, sc/-49, Galati.

Simionovici Elena, profesorino 25-j., str. Marcian s-7, 16, Botosani.

Maria Olaru, laboristino 22-j., jud. Timiș, Carpinis.

Uta Marian, teknikisto 21-j., Bul RSR 40, Bl. 1-E, Pitești.

Patraș Sorin, inĝeniero 31-j., Arini 10-A, ap 8, Suceava l.

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 10 (159) 1971

Ĉefa Enhavo

Nova Disvolviĝo de la Fera kaj Ŝtala Industrio de Ĉinio	1
Ĉinio Kreis Akupunkturan Anestezon.....	6
La Ĉefurba Sporta Halo.....	14
Lusin	17
Naskiĝloko	24
Havena Urbo ĉe Suda Maro.....	31
Pendoponto super la Flava Rivero.....	35
Nove Elfositaj Valoregaj Historiaj Restaĵoj.....	37
Malgranda Kemia Fabriko ĉe la Piedo de Ginniu-monto	41
Turni Malabundan Sezonon en Abundan.....	44
Ĉe la Haveno Huangpu.....	47
Inaŭguro de Bethune-vojo.....	49
Novaj Venkoj de la Tri Hindaĉiniaj Popoloj.....	50


Serĉado de Subteraj Riĉaĵoj

sur la Montaro Kunlun

Disvolvante la revolucion spiriton de penemo kaj spitemo al laco, la prospektoroj de la 15-a geologia taĉmento de Kinghaj trovis gravajn minojn por socialisma konstruado de nia lando, sur la neĝkovrita montaro Kunlun kun maldensa aero kaj alteco de pli ol 6000 metroj super la mara nivelo.

Kunlun-montara regiono en somero estas ankoraŭ kovrita de neĝo. La prospektoroj de la taĉmento marŝas al la celloko.





Ilia kampadejo sur neĝa monto



Ili faras enketon al tibetanoj pri subteraj riĉaĵoj.



Ili ĉiutage aŭskultas dis-
aŭdigon de Pekino.




Gvidantoj de la taĉmento faras ĉelokan esploron.



Atenta studo pri erca specimeno

Sentime antaŭen sur neĝkovrita kruta roko



61



Kuiristoj ĉiurime faras manĝaĵojn, spite de neĝo kaj nesufiĉeco de oksigeno.



Lernado

La taĉmentanoj trovis novan ercon



